


Esperanto
Ĥ - 4252 / 82 (1989)
1989 julio-aŭgusto
82-a jaro
n-ro 1003-1004 (7-8)
(aperas monate escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Ekde aŭgusto
la Jaro de Privat
reaŭdigos profetan voĉon.

Vi trovos

buntan salaton, someran aŭ vintran laŭ via hemisfero, ĉar la ĝardeno vigle fruktas lastatempe. En la bedo Singapuro fertilas la tero, en Svislando, Kubo kaj Pollando oni rikoltas publikrilatajn terpomojn, literaturan laktukon kaj sciencajn cepojn en abundo. Pri sem-teknikoj oni diskutas en Eŭropa Komunumo, sed kelkaj verdaĵoj jam dissterniĝas tie; novan kresko-sezonon alfrontas la fervojistoj, la instruistoj, kaj la Komisiono por Virina Agado. Sterkon por la junaj kaj ne-tiel-junaj plantoj oni ne forgesas en la recenz-rubriko, dum amaso da novaj ŝosoj trapikas la grundon en "Loke", "Fake" kaj – kompreneble! – "Laste aperis..."

Pri iu parto de la ĝardeno vi ne trovos raporton. Ĝin atakas frosto. Kontaktojn ni ja tenadas kun ĝi, iom singarde, sed la malvarmo malfaciligas parolon. Kaj ĉu niaj kontaktoj helpas aŭ malhelpas, pri tio ni entute ne havas ideon. Sendube dekmiloj da esperantistoj ĉirkaŭ la mondo solidaras kun niaj ĉinaj gekamaradoj, kun la sama sento de senpovo. Ni povas konsili nur, ke oni respektu la dezirojn de siaj amikoj kaj korespondantoj tie, sed restu ligita kun ili. Per aliloka varmo, ni eble povos fari pli eltenebla la froston, aŭ eĉ etgrade rapidigi la degelon.

Enhavo

- 121 Historio: Private kun Edmond Privat (Claude Gacond)
- 124 Esplorvojaĝo tra Azio: Longa tradicio sur la monda tegmento (Joachim Werdin)
Informado: Esperanto elstaras en svisa lingvofoiro
- 125 Scienca aplikado: Pola AIS-sesio oportunas (sed denove mankas kafo) (T. Tybłewski); AIS malfermos Teknikan kaj Artan Sektorojn
- 126 Regiona agado: Disaj vojoj en Eŭropo (Mark Fettes)
Lingvoproblemoj: Inter 40 kaj 50 milionoj (Liam O' Cuirc)
- 128 Faka agado: Okdek jaroj portas fervojistojn al epoko de utiligo (Petr Chrdle); Denove duonmilo da fervojistoj ĉe labora kaj distra kongreso (G. Ritterspach)
- 130 Instruado: Ekde 1989: la Monato de Internacia Enketado (S. MacGill)
Komisionoj: Por tutmondiĝo de la virina agado (Maria Taŝeva)
- 131 Lingvo: Finfine ne temas pri transitiveco (Otto Prytz)
- 132 Landa agado: La kuba movado viglas kulture kaj organize (Arnoldo Aguila; Maritza Gutiérrez)
- 133 Kongresa Komunikado de la 75-a Universala Kongreso en Havano
- 134 Recenzoj: *Esperanta bildvortaro*, red. Rüdiger Eichholz (Erich-Dieter Krause); *La fratoj Leonkoro* de Astrid Lindgren (Audrey Childs-Mee); *La nigra insulo* de Hergé (Bernhard Pabst); *La malgranda Johano* de Frederik van Eeden (Marjorie Boulton)
- 136 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 137 Reagoj: Ĝustigo geografia (Elda Doerfler); Hiperkosta HyperCard (Michael Urban); Por kvalito, ne kvanto... (Olga Cankova); ...aŭ inverse? (Marc Jeannier); Kaj kie la dekdua? (Ionel Onet); Mankas kunordigado (Umberto Stoppoloni)
- 138 Loke – Fake (mallongaj novaĵoj)
- 140 Nekrologoj
Kalendaro (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis septembro 1989)

La kovrilo

Oni admiras la oratorojn, eĉ se oni ne ĉiam kaptas la veron en iliaj vortoj. Edmond Privat estis pensanto pli radikala ol povis digesti lia epoko. Inter la socialismo-anarkiismo de SAT kaj la izolita neŭtraleco de UEA li maltrovis la sekvantojn, kiujn li meritis. Sed lia revolucia pacismo tamen trafis en kelkajn korojn. En nia ĉefartikolo, Claude Gacond utiligas la datrevenon de Privat por lanĉi fundan reekzamenon de ties verkaro kaj ĝia signifo por nia kunplektiĝanta mondo. Por detaloj pri la aŭgusta simpozio tiutema, turnu vin Kalendaren (p. 140).

esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). Legata en 105 landoj. Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: + 3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: + 3110 436 1751.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, University of Hartford, West Hartford, CT 06117-0395; tel. (203) 243-4417; telefakso: (203) 243-4070; telekso 9102505313.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86; telefakso + 81 3 461 7807; telekso J29400 tokinbth.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg hp. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (36/1) 317 243; telefakso (36/1) 666 808; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.

Private kun Edmond Privat

La svisa urbo Ĝenevo scenejis, la 17-an de aŭgusto 1889, la naskiĝon de unu el la plej rimarkindaj Esperanto-aktivuloj de nia unua jarcento. Edmond Privat komencis sian movadan karieron nur dektrijara, fondante kun sia samklasano Hector Hodler la revuon JUNA ESPERANTISTO. Deksesjara li kunorganizis la duan Universalan Kongreson, dekokjara li prelegvojaĝis tra Usono. Inter la jaroj 1920 kaj 1934 li redaktis la revuon ESPE- RANTO kaj ankaŭ organize li centre rolis en la internacia movado, gvidante la kampanjon ĉe Ligo de Nacioj, prezidante UEA, aranĝante internaciajn konferencojn. Li estis eble la unua kvalita poeto en Esperanto, kaj ĝia unua grava historiisto. Apud ĉio ĉi li kondukis aktivegan diplomatan kaj politikan vivon, surbaze de principoj kiuj faris lin amiko de Romain Rolland kaj Mahatma Gandhi. Praktika utopiisto li estis, kiu trovis en Esperanto lingvan esprimon de siaj vivkonvinkoj.

Kiel inaŭguran tekston por la Jaro de Privat, de aŭgusto 1989 ĝis aŭgusto 1990, ni prezentas jenan meditaĵon de Claude Gacond. Temas pri rememoroj pri la junula tempo: la direktoro de Kultura Centro Esperantista, naskita en 1931 kaj konatiĝinta kun Privat kiel dekelkjarulo, donas trafan bildon de la homo malantaŭ la postenoj. Por objektiveco estos tempo poste.

En la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds ekzistas "Salono Edmond Privat", kie la 17-an de aŭgusto ekfestiĝos lia centjara datreveno. En tiu muzeeto troviĝas ne nur la libraro kaj arkivaro de la biografo de Ludoviko Zamenhof, sed ankaŭ kelkaj mebloj: lia skribo-tablo, lia unua tajpilo kun la supersigno, kestaro (kiun li nomis "Noa ŝipo") kie li deponis po tri specimenojn de siaj libroj kaj artikoloj, kaj kelkaj objektoj kiuj memorigas lian amikecon kun Romain Rolland, Mahatma Gandhi kaj Ludoviko Zamenhof, kaj liajn ĵurnalistajn vojaĝojn en Usono, Ruslando kaj Hindio.



La ĵurnalistoj en sia metiejo: pri paco kaj politiko dum 50 jaroj.

Montrante al gastoj tiun rememorigejon, mi ofte konstatas ke tiuj atestaĵoj emociigas la vizitantojn. Ili kreas etoson favoran al meditado, al la ek- aŭ relego de alvokoj al homaranismo, al universaleco, al defendo de la subprematoj, al mondanismo kaj neperforto. La "Salono Edmond Privat" estas unu el tiuj lumejoj, kiuj orientigas ne nur parolantojn de la zamenhofa lingvo, sed ankaŭ adeptojn de aliaj movadoj: mondcivitanojn, serĉantojn de neŭtrale homa religio, virinojn luktantajn por la pleneco de siaj

rajtoj laboraj kaj civitaj, sindikatanojn kiuj rifuzas la klasbatalajn simpligojn malamigajn: idealistojn, kiuj konservas optimismon en la plenumo de sia tasko. Oni tiam ekkonscias, kiom profunde la amiko de Hector Hodler influis kaj plu influas la penson de multaj homoj, maljunuloj lin konintaj, junuloj lin malkovrintaj per tralego de liaj verkoj. Oni eksentas, ke oni troviĝas en privilegia loko, ĉe homo kiu el la transmondo daŭrigas sian alvokon por la realigo de utopioj.

Ĝuste pri tiu realigo de utopioj parolis Edmond Privat, konklude al serio de radio-prelegoj aŭtobiografiaj ĉe la tiam "Kurtunda Servo de Svisa Radio-Societo". Ties tekstoj eldoniĝis ĉe Stafeto (J. Régulo) en 1962, la jaro mem de lia morto, sub la titolo *Aventuroj de pioniro*. Estas ĝojige, ke nun tiu libro estas denove aĉetebla dank' al agado de UEA. Ĝi devus esti unu el tiuj verkoj, kiuj ne elĉerpigas, ĉar ĝi instigas la legantojn al agado.

Ni citu el tiu ĉapitro eron, kiu karakterizas la spiritan sintenon de Edmond Privat:

Se nun mi postrigardas al la duoncentjaro de publika agado kaj verkado, mi konstatas la jenon: dum la tuta vivo necesis kaj necesas ankoraŭ batali kontraŭ antaŭjuĝoj. Aferoj, kiujn oni juĝis utopioj, nun fariĝis realaĵoj.

"Neniam homoj diverslandaj komprenos unu la alian per Esperanto pro elparolaj diferencoj," diris miaj instruantoj en gimnazio. Niaj kongresoj pruvas la malon.

"Neniam homoj flugos en aero, ĉar tio estas utopio," ili diris. Nu, mi vojaĝas fluge al kongresoj.

"Neniam la virinoj voĉdonos. Estas utopio." Ili nun voĉdonas preskaŭ ĉie en la mondo.

"Neniam poloj rehavos propran ŝtaton. Estas utopio," diris la gazetoj, kiam mi pledis kaj verkis por tiu revivigo. En 1918 Polujo fariĝis ŝtato.

"Neniam la angloj forlasos Hindujon. Estas utopio," skribis la samaj gazetoj, kiam mi klopodis klarigi la celon de Gandhi. Nun ili ĉiutage rakontas pri Hindujo kaj Nehru.

"Neniam vi sukcesos, ke la homoj abonu radioaŭdodon. Ili jam havas gramofonon," diris la bankistoj, kiujn mi vizitis por fondi Radio-Genève. Nun ili bedaŭras, ke kooperativa societo, ne ili, havigis al ni la monon, kaj la buĝeto atingas milionojn, feliĉe sen iu privata profito.

Edmond Privat konkludis tiun vivraporton dirante:

La bataloj multe suferigis, multe lacigis, sed ĉiuj utopioj, unu post la alia, realiĝis kaj alportis ĝojon. Restas ankoraŭ inter la aferoj, kiuj okupis mian tempon, la ĝeneraligo de mondlingvo kaj la kreo de vera federala mondregistaro. Feliĉe, pli junaj apostoloj ekzistas por daŭrigi tiujn batalojn kaj ni danke ĝojas, kiam ni sukcesis inspiri junulojn, ke ili siavice laboru por pacaj celoj. Same d-ro Zamenhof inspiris nin, kaj al li mi persone ŝuldas mian intereson al ĉiuj celoj, kiuj tuŝas al unueco kaj harmonio de la homaro, kiu restas por mi la senco kaj salo de nia mallonga vivo sur tiu ĉi tero.

Jen kiel mi intimiĝis kun la penso de Edmond Privat. Mia familio, loĝanta en Neuchâtel, abonis la semajnan kooperativan organon *Coopération*, kaj kiel por multaj infanoj de mia generacio, mia ekinteresiĝo pri gazetoj efektiviĝis per regula legado de la kroniko de Edmond Privat pri la internacia vivo. Poste alvenis la atenta tralego de la revuo *L'Essor*, kiun Privat redaktis. Precipe la unua el tiuj organoj, ĝuste tra liaj artikoloj, orientigis homojn favore al multaj progresivaj tendencoj. Kiam la virinoj akiris civitanekon egalan kun la viroj, pluraj legantoj de Privat sendis al li dankleterojn kaj gratulojn.

Mi tutcerte estis unu el liaj influatoj, kiuj preferis legi pri la emancipiĝo de la popoloj, pri neperfortaj agadoj ekzemple de Danilo Dolci en Italio, ol pri ĵeto de bomboj kaj mortigo de malamikoj. Tra Privat ni komprenis, ke la malamikoj ŝanĝiĝas,

ke ilin tre ofte fabrikas la registaroj por pense sklavigi la popolojn kaj akceptigi ĉe ili la ideon de arma defendado.

En la biblioteko de Neuchâtel mi malkovris, ke ankaŭ en la socialdemokrata ĵurnalo *La Sentinelle*, eldonata el La Chaux-de-Fonds, aperis regule, eĉ ĉiutage, artikoloj de Privat. Ili ne nur analizis la mond-eventojn. Ili lumigis ankaŭ sociajn okazaĵojn. Avidi mi legis ilin, kaj ili tutcerte instigis min aliĝi al la socialista partio – kvankam mi kontraŭis la marksisman heredaĵon, kiu nur iomete kolorigas la svisan socialismon.

Iun vendredan posttagmezon mi renkontis mian onklinon, kiu estis instruisto en Neuchâtel. Ŝi rakontis, ke ŝi iras al kunsido en la Popoldomo, kie tre regule, vendredon post vendredo, Edmond Privat respondas al demandoj de la publiko. Mi akompanis ŝin, kaj mi estis profunde impresita de la reganta etoso. Ĉeestis sufiĉe vasta publiko en longa saloneto: membroj de la socialista kaj aliaj partioj, sindikatanoj, kooperativanoj, sed ankaŭ simpla publiko kun multaj virinoj kaj eĉ kelkaj gejunuloj, verŝajne universitataj studentoj. Ĉiuj amike babilis, ĝis kiam iom solene eniris Edmond Privat. Li fakte paŝadis malfacile. Mi poste eksciis, ke la kokso doloras lin. Karakterizis lin afabla rido iom enigma kaj rigida, de suferanto. Eĉ kiam li rakontis pri teruraĵoj, tiu rideto lumigis lian vizaĝon kaj malhelpis nin tro emociiĝi.

Li sidiĝis kaj neatendite ekregis silento dum kelkaj minutoj. Mi poste komprenis la rolon de tiu silenta enkonduko. Kiel kvakero li kredis je la komunikivo de la silenta meditado, kaj fakte post tiu neordinara enkonduko neniu estus kuraĝinta insulti la aliajn, kiel tiom ofte okazas en pripolitikaj kunvenoj. En ĉeesto de Privat ni sentis la bezonon kompreni alies opiniojn kaj respekti ilin, eĉ se ili kontraŭdiras la propran. Ekde tiam mi sentas naŭzon vidalvide de la politikistaj gvidantoj, kiuj emas perforte transformi alies vortojn por diri per ili ion, kion tutcerte la dirinto ne intencis esprimi kaj eĉ ne pensis.

Mi fariĝis sufiĉe regula partoprenanto en tiuj kunvenoj, kaj iun tagon, kiam mi estis elironta, Edmond Privat alproksimiĝis kaj demandis: “Vi estas gimnaziano, ĉu ne?” Mi respondis jese, kaj li klarigis, ke la irado al la universitato fariĝas por li pli kaj pli peniga. Por eniri tramon li devis esti suprenpuŝita, kaj por eliri estis tuta problemo. Kaj li petis mian helpon. Ni fakte adaptis lian iradon al la universitato kun mia studhoraro, kaj dum pli ol unu jaro semajnon post semajno mi akompanis lin. Li estis dika kaj peza, kaj mi ĉiam timis, ke mi ne povos reteni lin, kiam li eltramiĝis. Se ni havis sufiĉe da tempo, kiam la vetero estis favora, Privat preferis marŝi trankvile borde de la lago, kaj tiam li rakontis al mi siajn aventurojn, informiĝis pri miaj ideoj, konsilis legaĵojn. Mi ne konsciis, kiom privilegia mi estis havi tiun regulan kontakton kun fakte granda kaj kuraĝa homo. Mi nun bedaŭras, ke tiam ne venis al mi la ideo raporti en taglibro pri la diroj de Privat.

Eble pro lia influo mi aliĝis, kiam alvenis la gimnaziaj ferioj, al la pacmovado Internacia Helpservo Civila. En tradicia semajnfina kunveno aŭtuna, kiu analizis la okazintajn laborrestadojn, Edmond Privat estis unu el la regulaj prelegantoj. Dum tiuj renkontiĝoj mi aŭdis lin rakonti pri siaj kontaktoj kun Mahatma Gandhi, pri la luktoj de la usonano Martin Luther King, pri la enkarcerigoj de Pierre Ceresole ktp. Multon mi tiel lernis pri la porpacaj aktualizaĵoj.

En 1952 mi eklernis Esperanton, kaj transprenis la gvidadon de naskiĝanta E-junularo jam en 1954. Plian tipon de kontaktoj kun Edmond Privat havigis al mi tiu agado. Ekde tiam mi ekkonatiĝis kun la modesta hejmo de samideano ĉiam helpema kaj preta doni konsilojn. Ofte li prelegis en la kunvenoj, kiujn ni organizis. Dum pluraj kunsidoj li analizis antaŭ ni sian poresperantan agadon, farante bilancon pri la sukcesoj

kaj malsukcesoj. Li ofte rakontis pri la fondo en Usono en 1908 de Internacia Esperanto-Instituto kun sidejoj en Ĝenevo, Parizo kaj Novjorko. La unua mondmilito pereigis tiun agadon, kies ĉefa celo estis la klerigo de Esperanto-instruistoj kaj la organizo de ekzamenoj.

Li ankaŭ raportis pri la internaciaj konferencoj, kiujn li organizis. En 1922 ĉe Ligo de Nacioj en Ĝenevo pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, en 1923 en Venecio pri la komerco, en 1924 denove en Ĝenevo pri la radio, en 1927 en Prago pri paco per lernejoj. Li ankaŭ rakontis pri la organizo de la unua Somera Universitato kadre de la 17-a Universala Kongreso en Ĝenevo en 1925. Li tiam esperis, ke tiu aranĝo grupigos pere de Esperanto kreskantan nombron da studentoj kaj da prelegantoj dum la tuta somero antaŭ kaj post la UK. Ĉar ĝi restis enfermita en la kongreso mem, tio por Edmond Privat estis vera aborto kultura.

Tial en 1930 kun Andreo Cseh, Pierre Bovet, Julia Isbrücker kaj kelkaj aliaj, li refondis en Hago Internacian Esperanto-Instituton, la intertempe famiĝintan Cseh-instituton, kun preciza celo: eduki instruistojn, organizi ekzamenojn, maturigi instru-metodikon. Lia verko *Esprimo de sentoj en Esperanto* resumas la enhavon de supera kurso, kiun li gvidis por IEI kadre de universitata kurso en Arnhem, paskon 1932. La dua mondmilito refoje abortigis tiun strebadon al iom-post-ioma konstruo de universitatnivela instituto.

En la jaroj post la milito, do, Edmond Privat pli kaj pli alvokis al la kreo de poresperanta kaj peresperanta altlernejo. Tio okazis la lastan fojon en 1962, kelkajn monatojn antaŭ lia morto. Malgraŭ la neantaŭvidita perdo de tiom utila konsilanto, lia projekto restis vivanta en ni. Jam en 1964 povis esti inaŭgurita, en la biblioteko de La Chaux-de-Fonds, la Dokumentaro Edmond Privat – kiun poste pligravigis fondo de la nun famiĝinta CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia.

La 15-an de decembro 1968 fondiĝis Kultura Centro Esperantista en la dulingva urbo Biel-Bienne, kun la celo iom post iom realigi la projekton de Privat. Ho, li antaŭdiris ke la agado estos peniga, pli malfacila ol ni imagas, ke ĝi vekos kontraŭstaron ne nur flanke de la “krokodiloj”, sed ankaŭ en la Esperanto-movado mem, kiu (kiel ĉiu normala homa socio) timas ĉiun novan dimension. Ofte li asertis, ke “nia movado nur vorte movemas”.

Ĉi tiu raporto pri personaj kontaktoj havas kiel nuran celon, montri kiom profunda estis la influo de Edmond Privat sur multajn homojn. Kiel li diris en sia konkludo al *Aventuroj de pioniro*: li sukcesis inspiri junulojn, kiuj siavice transprenis la laboron.

Ni ne povas interesiĝi iom private pri Edmond Privat sen eksondi lian religian sintenon. Estas nedubinda fakto, ke multe influis lin la religia penso de Zamenhof. Ni ne forgesu, ke tiu, kiun oni tiam nomis “la Majstro”, unuafoje konigis sian profundan penson ĝuste en Ĝenevo, okaze de la 2-a Universala Kongreso – kongreso, kiun grandparte organizis la deksepjara Edmond Privat kaj la deknaŭjara Hector Hodler. En tiu sama jaro 1906 la zamenhofaj ideoj aperis anonime, sub la titolo *Dogmoj de Hilelismo*. Jen unu el tiuj principoj, kiu daŭre reeĥas en la verkoj de Privat:

Kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon “agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco”; ĉion alian en mia religio mi rigardas nur kiel legendojn aŭ kiel religiajn morojn.

Edmond Privat ofte revenis al tiuj religiaj moroj. Li eĉ identigis

la nocio *moralo* al tiu de aro da moroj aŭ de *moraro* : “Patriotismo estas kunmetaĵo el revolucio kaj konservemo. Similaj elementoj kreskigas novan moralon aŭ moraron.” Privat, kiel Zamenhof, rifuzis la kunluigon de la nocioj patriotismo kaj religio, kion li nomis “nacia religio”. La komenco de *Interpopola konduto* (Literatura Mondo, 1935), en Esperanto la fundamenta verko por intimiĝi kun lia profunda penso, estas tiurilate pensiga:

En la dudeka jarcento post Jesu-Kristo, Azio pruntas el Okcidento ties ĉefan kredon. Ne kristanismo ĝi estas, sed naciismo. Tiu kredo rigardas la ŝtaton kvazaŭ korpon kaj la patrujon kvazaŭ animon.

Unua patrujo de l' infano estas la patrino. El ŝi li apartiĝas kun timo, kaj ekkonscias malrapide pri ekzisto sendependa. Kiam li akiris tiun iluzion, li jam devas ĝin perdi. Unue familio. Poste patrujo. Al ĝi li devas reporti la filan amon kaj la sopiron al varma rifuĝejo. Se venos milito, li devos al la patrujo la vivon mem oferi. Laŭ tiu mezurilo jam li komprenas, ke tio estas la ĉefa religio ĉirkaŭ li. Kiu kredo plej multe postulas, tiu plej multe gravas.

Nacian konscion oni kulturas en lernejo, en preĝejo, en la hejmo, en gazetaro, en armeo. Per ĝi la homo super si mem altiĝas. Per ĝi li partoprenas en estaĵo multobla kaj dia. Naskiĝa tero fariĝas templo, gepatra lingvo kvazaŭ komunio, nacia flago kvazaŭ sanktaĵo, ŝtata himno kvazaŭ preĝo kaj milito jam ofero sur altaro.



Ĉi tiel oni vidis la junan Privat, kiu jam antaŭ la Unua Mondmilito havis la reputacion de fekunda kaj saĝa verkisto.

Profetone, kiel Zamenhof, Privat objektivite observas: “Kion faras la homoj el sia dio nacia?” En *Aventuroj de pioniro* li skribas pri vizito al Zamenhof en 1916:

Li deziris kunvoki kongreson de universitatuloj por diskuti la kreon de universala kadro por diversgentaj kaj diversreligiaj homoj, kiuj sentus sin unuigitaj per komuna etiko kaj toleremo, kaj lin tre ĉagrenis la penso ke li verŝajne ne povos mem daŭrigi tiun taskon.

“Estis la celo de mia tuta vivo,” li ripetis. “Por ĝi mi fordonus ĉion ofere. Se mi nur ne estus tiel senforta, senpova ĉi tie, fortranĉita el mondo.” Profunde mi sentis la dramatan alvokon de lia animo kaj ĝi poste influis mian propran vivon, inkluzive la klopodon por interkompreniĝo inter Okcidento kaj Oriento.

Privat konkludas: “Mi ankoraŭ nun sentas devon fidele labori al la realigo de la zamenhofa idealo, se ne sub la sama formo, kiun li antaŭvidis, almenaŭ kun la sama celo.”

Priate fakte ne kaŝis sian aliĝon al la kvakerismo. Estis dum la agado ĉe Ligo de Nacioj, ke li konatiĝis kun la kvakeroj, kiuj oftis en tiu porpaca organizaĵo. Tiuj “modestaj kaj vere frataj homoj” tuj vekis ĉe li simpatian:

Ŝajnis al mi, ke tiu sinteno, modesta kaj sentima, korespondis plej proksime al la idealo de Zamenhof, kaj mi pli kaj pli interesiĝis al la agado de la kvakeroj por helpi la malsatajn popolojn, ĉefe la infanojn, kaj por defendi la homajn rajtojn de nigruloj en Ameriko kaj Sudafriko. Ankaŭ mi konstatis, ke en la Societo de Amikoj regas plena egaleco de virinoj kun viroj kaj mi ja sciis, ke jam de la tempo de Cromwell la Amikoj estis la unua grupo de homoj, kiuj rifuzis konsideri unu sekson kiel superan al la alia. Tiuj pioniroj plaĉis al mi kaj ni fariĝis amikoj.

En siaj prelegoj li ofte rakontis pri William Penn kaj la fonda de Pensilvanio kaj Filadelfio en Nordameriko:

Ilia pensilvania kolonio estis paca loko, kie oni ne ŝtelis la teron de la indianoj, sed aĉetis ĝin per honesta pago kaj pace vivis kun la ruĝhaŭtuloj, kiuj fariĝis grandaj amikoj de la kvakeroj. Ankaŭ mi mem amikiĝis kaj ĉiam restis en bonaj rilatoj kun ili dum tuta vivo ĝis mi fine post tridek jaroj aliĝis al ilia Societo de Amikoj pro ĝia laika silenta karaktero kaj pro ĝia toleremo kaj amikeco al ĉiuj homoj sen ia antaŭjuĝo pri ilia raso aŭ religio.

Fakte lia kvakerismo objektivema kaj senkompromise kuraĝa daŭre vivas. Ĝi multe influis unuflanke la svisajn kvakerojn kaj la legantojn de lia revuo *L'Essor*, kaj aliflanke generaciojn de esperantistoj, kiuj estis en rekta aŭ lega kontakto kun li. Sub la redaktado de Privat, *L'Essor* iel fariĝis la organo de la Amikoj de la Amikoj, t.e. la amikoj de la kvakeroj.

En franclingva parolado, kiun li faris la 22-an de septembro 1940 al la Amikoj de la Amikoj, Privat prezentis ses tezojn, kiuj resumas la esencon de la religia sinteno de la kvakeroj, kiel Privat ĝin konceptis. El ili li plej vaste komentariis la tezon, kiu asertas ke “Kreda libero estas paŝo al fratiĝo kun la eksterkristana mondo.” Kiuj enprofundiĝas en la religian esploron kun sincereco kaj amo al la aliaj, tiuj malkovras, ke sub la dogmoj kaj moroj, kiuj fosilias la religiojn, brilas la samaj eternaj veroj. La spirito floras ie ajn kaj en iu ajn medio; neniua religio aŭ sekto monopolas saĝon kaj sindonon. Tiun temon li disvolvis en libro titolita *Sagesse de l'Orient* (Orienta saĝo).

Legante liajn komentariojn, oni pli kaj pli havas la impreson esti mem en kontakto kun saĝulo el Oriento. Edmond Privat konceptis la vivon kiel nur pruntricevitan vestaĵon. Sin alkroĉi al ĝi estus nura iluzio, ĉar la individua ekzisto egoisma kaj disigita finiĝas ja per la morto. Kiam oni rezignas al tiu alkroĉiĝo por vivi en la daŭra nuno je la servo de aliaj, tiam oni ĉesas ekzisti space kaj tempe, ĉar oni kuniĝas al tio, kio daŭras kaj etendiĝas al ĉiuj estaĵoj pasintaj, nunaj kaj estontaj.

La homo, kiu kreskigas en si tiun konscion de la tuto, malkovras la universon laŭ nova vidpunkto. Laŭ Edmond Privat li ĉesas malkuraĝi, ĉar li konscie partoprenas la konstruon de la historio de la mondo.

Claude Gacond

Longa tradicio sur la monda tegmento

Sur la “tegmento de la mondo”, precize en Katmanduo, mi restis nur ses tagojn, gastante ĉe Baikuntha M. MASKEY – malnova esperantisto, kiun instruis Tibor Sekelj antaŭ pli ol tridek jaroj. Krom li mi renkontis tri aliajn movadanojn, kun kiuj mi parolis pri la nepala movado. Post la lanĉo de la movado fare de Sekelj en la kvindekaj jaroj, venis tien Simo Milojević aŭspicie de UEA (vd. la januaran numeron, p.2). Li laboris ok monatojn, tiel ke post lia forveturo restis centoj da esperantistoj. La nepalaj esperantistoj aktive agis, ili estis plenaj je energio, ideoj kaj junaĝfervoro. Sed kun la tempopaso ili iĝadis malpli kaj malpli aktivaj – la ĉiutaga vivo, profesia laboro, familio estis pli gravaj. Nun, post dudek sep jaroj, en Nepalo preskaŭ ne ekzistas Esperanto-movado. Restas kelkaj esperantistoj, precipe en Katmanduo. “Mi ne povas agi sed mi povas helpi, se ekzemple la junularo ekaktivus,” diris Shree Prashad SHRESTHA, unu el la malnovaj pioniroj. La samon diris mia gastiganto, kiu cetere jam survojis kontakti la nepalajn esperantistojn cele al eventuala renovigo de la movado. Maskey ankaŭ estas preta kunlabori kun esperantistaj vojaĝentreprenejoj: skribu al li ĉe PO Box 3030, Kathmandu. Aparte kaj longe mi interparolis kun Gamvir Man SHRESTHA, delegito de UEA. Li havas pli da libera tempo dediĉebla por Esperanto kaj ja aktivus, kvankam – ŝajnas al mi – ne kunlabore kun aliaj esperantistoj en Nepalo. Antaŭ naŭ jaroj li fondis Jogambaran Instituton de Esperanto, kun la celoj disvastigi kaj instrui la lingvon kaj eldoni librojn. Gamvir volas organizi grandan ekspozicion pri Esperanto kaj inviti la ministron pri edukado inaŭguri ĝin. Ĝis nun mankas materialoj por tio: skribu al li ĉe PO Box 4033, Kathmandu.

Same kiel en Pakistano, mi konstatis ke multaj homoj apogas Esperanton kaj volonte lernus ĝin, se ekzistus la kondiĉoj por tio. Ankaŭ la gazetaro favoras. En Nepalo la grundo estas bona, eĉ tre bona, ĝi atendas laboreman semanton kaj fleganton.

Eta semo en Malajzio

Supozeble vi neniam scias pri la movado en Malajzio, ĉar ĝis majo de ĉi tiu jaro ĝi tute ne ekzistis. En la UEA-adresaro estis nur tri adresoj de esperantistoj el Malajzio. Kun la sola loka esperantisto de Kualalumpuro, kiu eklernis la lingvon en 1981 en Roterdamo, mi povis malrapide paroli Esperante. Alia esperantisto el la norda parto de la lando korespondis kun mi angle – ne mirige, ĉar en Malajzio oni parolas tiun lingvon ekde la infanaĝo, dum Esperanton oni tute ne povas praktike uzi.

Kun la helpo de neesperantisto, d-ro Gopinath, mi povis renkonti ĵurnalistojn kaj radio-redaktistojn. Pli ol 50 personoj venis al la unua kunveno por ekscii pli pri Esperanto; el ili proksimume 30 finis intensan kurson du- aŭ trisemajnan. La 1-an de majo la gekursanoj kunvenis kaj fondis Malajzian Esperanto-Asocion. Nun la elektita estraro klopodas registri la asocion (tio longe daŭras en Malajzio). Intertempe la membroj decidis kunveni ĉiun sabaton por pli lerni la lingvon kaj komenci diskonigi ĝin.

Viaj ideoj, konsiloj kaj proponoj estas atendataj ĉe: Zainuddin Zakaria, suite 147, the Merlin, 2 Jalan Sultan Ismail, 50525 Kuala Lumpur, Malajzio (tel.: 248 0033, fako 1847).

Eksterordinara intereso en Singapuro

Antaŭ proksimume 40 jaroj estis aktiva E-societo en ĉi tiu eta sed ekonomie vigla angulo de sud-orienta Azio. Iu kolonelo el la brita armeo gvidis ĝin, kaj post lia forveturo la movado

malrapide mortis. Post mia alveno mi sukcesis renkonti kvar personojn, kies adresojn mi havis de la UEA-komputilo. Kun ili oni povas interparoli Esperanton pli-malpli bone. Ili tamen ne trovis tempon por aktivi, kaj do praktike ne ekzistis loka movado.

Mi aranĝis artikolojn kaj anoncojn en ĵurnaloj, supozante ke en ĉi tiu lando, unu el la plej malgrandaj en la mondo, ne pli ol 40 personoj venos al informvespero kaj eble duono el ili komencos kurson. Granda estis mia miro, kiam sume proksimume 400 personoj telefonis aŭ venis al la kunvenoj. La 15-an de majo mi komencis instrui al ĉ. 200 homoj en kvar grupoj, po 90 minutoj tage. Ĉe la fino mi disdonis proksimume 120 atestilojn, kaj kun pluraj el la novaj esperantistoj mi povas interparoli Esperante. Mi demandis, kial ili volas lerni Esperanton. Pli granda parto de la demanditoj respondis, ke ili volas vojaĝi al Eŭropo kaj supozas ke tiu lingvo estas tie pli utila ol la angla.

Singapura Esperanto-Asocio estis fondita la 27-an de majo. Nun ĝi havas proksimume 120 membrojn kaj la nombro estas kreskema. La provizora estraro procedas por registri la asocion. Kiel nova asocio ili ne havas sperton kaj scion pri Esperanto, sed tamen laboremon kaj planojn. Se vi volas konsili al ili, korespondi, viziti Singapuron aŭ alimaniere helpi, skribu al Singapura Esperanto-Asocio, c/o 372, East Coast Road, 1542 Singapuro.

Joachim Werdin

INFORMADO

Esperanto elstaras en svisa lingvofoiro

Lastatempe tre disvastiĝis en okcidenta Eŭropo la fenomeno de “lingvofoiroj”: ekspozicioj pri la lernado kaj uzado de fremdaj lingvoj. Ties oportuneco por Esperanto estas tuj evidenta. Unuiĝo Franca por Esperanto kiel la unua sciis rajdi la ondon, aranĝante budon – ĉi-jare jam la trian fojon – en la pariza lingvofoiro Expolangues. En pluraj aliaj landoj la lokaj asocioj agis simile, ekzemple Kooperativo Eldona Esperanto partoprenis en marto similan aranĝon en Milano. Plej laste, inter la 26-a kaj 30-a de aprilo 1989 Svisa E-Societo kaj Kultura Centro Esperantista organizis allogan prezenton ĉe la unua okazigo de Mondolingua, Foiro pri Lingvoj kaj Kulturoj en Ĝenevo. Tiel sukcesa estis tiu sperto, kaj samtempe tipa pri la lingvofoiroj ĝenerale, ke ŝajnas inde resumi ĝin por instigi imitontojn.

Plentempe deĵoris Claude Piron, kies verva varb-elokvento jam fariĝis preskaŭ proverba en la movado. Lin helpis dekduo da aliaj, dum la budon surloke pretigis profesia dekoraciisto, s-ino Strahm, kune kun ges-roj Piron. Kiel atentokaptiloj rolis du okulfrapaj sloganoj* sur la flankaj muroj kaj aro da profesiaspektaj libroj – du Tinĉoj, Asterikso, La eta princo kaj aliaj infanlibroj, Esperanta antologio, la dulingva Sonetoj de Ŝekspiro (tr. Auld), la Korano ktp. Sur la fona muro pendis mapo de Japanio, sur kiu kolorpingloj videbligis la lokojn, kie UEA-delegito troviĝas. Franclingva klarigo konigis la signifon de tiu mapo, kiu montriĝis konstanta kaŭzo de miro: “Rigardu! Eĉ en Japanio oni parolas Esperanton!”

* Sloganoj estas tute aparta fako en la informado – kvazaŭ unufrazaj poemoj. Tiuj en Ĝenevo estis bonaj ekzemploj: *L'espéranto: une autre idée de la communication*, *l'espéranto: une haute idée de la communication* (Esperanto: alia ideo pri komunikado, Esperanto: alta ideo pri komunikado, kun vortludo inter la similsonaj francaj vortoj por “alia” kaj “alta”), kaj *L'espéranto: le meilleur tremplin pour l'étude des langues* (Esperanto: la plej bona saltotabulo por lingvistudado). Ĉu niaj legantoj konas aliajn aparte taŭgajn en sia nacia lingvo? Ni volonte dediĉos artikolon al tiu temo, se venos sufiĉe da reagoj.



Krynica provizis belan fonon por la pensa laboro; ĉi tie d-ro T. Tybłewski kaj doktor-kandidatino mag. G. Gradzińska paŭzas inter la lekcioj.

Tablo ĉe-koridora ebligis al la vizitantoj laŭvole preni informilojn. Apud ĝi, dosiero kun specimenoj de ordinara, scienca, ĵurnalista, poezia Esperanto kaj kun diversaj indikoj pri la maniero, laŭ kiu la lingvo funkcias (vortfarado ktp) estis foli-umebla kaj ofte foliumata. Sur alia tablo troviĝis lerniloj, vortaroj kaj libroj diversaj.

La foiro estis grandkvante vizitata: pli ol 14 000 eniroj registriĝis. Multegaj personoj do pasis preter la Esperanto-budo. Kelkaj grumbluloj manifestis sian nekontenton aŭ ironie sarkasmis pri Esperanto, sed ili estis tre malmultaj. La sinteno de la plimulto estis scivola, mira kaj favora. La Esperanto-budo elstaris, ĉar preskaŭ ĉiuj aliaj ekspoziciantoj proponis nur kursojn pri la angla lingvo en iu anglalingva lando. Ili ne elmontris materialon kaj do aspektis senreliefe. La efiko de la kolorplena Esperanto-budo al tio ege kontrastis; kaj krome temis pri budo, kie eblis diskuti. Se iu petis detalojn kaj unu el la buduloj komencis klarigi, tuj formiĝis aro da aŭskultantoj, kiu kelkfoje eĉ ŝtopis la koridoron.

Inter la mankoj menciendas la foresto de anglalingva inform-materialo kaj de plurpaĝa, sed tamen sufiĉe detala, historio pri la lingvo. Surprize ofte aŭdiĝis peto pri tia verketo. Ankaŭ disponi sufiĉan librostokon por vendi surloke estus utile (entute trideko da mendoj registriĝis). Anstataŭ la komputilo kun la parol-programo Esparol, kiun ĝenerale prizorgis juna Marion Grosjean (kaj kiu tamen vekis intereson ĉe pluraj lingvo-instruistoj), eble preferindus havi bonan kased-aparaton, kiu diskrete aŭdigu Esperantajn kantojn.

Rezultis de tiu agado: multaj petoj por informoj, 43 dezi-rantoj partopreni vesperan kurson (kies nombro espereble malaltiĝos antaŭ la kurskomenco en oktobro, alie stariĝos seriozaj organiz-problemoj), peto al Claude Piron verki artikolon en *UN Special* (la periodaĵo de la UN-personaro en Ĝenevo) kaj en la bulteno de la Internacia Asocio de Konferencaj Interpre-tistoj, kaj intervjuo kun la plej populara svisa semajna magazino franclingva, *L'Hebdo*.

Konklude: plej sukcesa aranĝo, kiun oni nepre refaru en 1990 kaj poste. Malmultaj okazoj informadi vastan publikon prezentiĝas tiel favore.

Pola AIS-sesio oportunas (sed denove mankas kafo)

De la 17-a ĝis la 30-a de majo okazis la dua sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino en Krynica, Pollando. Ĝin partoprenis 60 homoj el ses landoj, ĉefe Pollando kaj Sovetunio. Malgraŭ la nealveno de du lekciantoj, la tuta programo sukcese efektiviĝis en du najbaraj konstruaĵoj. Ĉiun eron povis ĉeesti la studentaro, ĉar oni evitis paraleligon, kaj eĉ disponeblis tempo ĉiutage por utiligi la riĉajn eblojn de la fama kurac-loko.

Lekciis kaj prelegis AIS-anoj Tadeusz Ejsmont, Helmar Frank, Michel Duc Goninaz, Kristina Niewiadomski-Kauffmann, Włodzimierz Opoka, Johan Pachter kaj Tyburcjusz Tybłewski, subtenate de aro da aliaj homoj. Por unu vespero aperis Jerzy Handzlik kun siaj logaj kanzonoj. Ankaŭ Agata Spakovska el Minsk (Sovetunio) helpis per altnivela muziko ligi la partoprenantojn.

Por la tridek kvar ekzamenatoj akireblis po tri studunuoj, laŭ la postuloj de la sanmarina.studregularo. Kandidatiĝis por la adapta adopto de pli frue akiritaj gradoj, aŭ por la akiro de nova per originala disertacio prezentota al AIS, 28 personoj (magistrec 15, doktoreco 13). Kvankam oni ne tro trinkis kafon, kies manko sentebis same kiel en Sanmarino mem [vd. *Esperanto* 1989/p.48], la sciencaj diskutoj ne malofte viglis.

La relative altaj kotizoj ebligis al la organizantoj starigi fonduson, akorde kun la reguloj de AIS, por pagi honorarion al ĉiuj kontribuintoj.

T. Tybłewski

AIS malfermos Teknikan kaj Artan Sektorojn

Dum la 6-a Sanmarina Universitata Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), kiu okazos la finan semajnon de aŭgusto, la Teknikan Sektoron inaŭguros la nepo de la iniciatinto de Esperanto, d-ro inĝ. L.C. Zaleski-Zamenhof. Okaze de la lanĉo de la Arta Sektoro, d-ro Fabrizio Pennacchietti aranĝos ekspozicion i.a. de beletraj kaj muzikaj kulturaĵoj en la internacia lingvo. (Proponojn pri sonbendoj taŭgaj por la SUS-publiko sendu al li ĉe Via delle Rosine 10, I-10123 Torino, tel. +911-831856.)

La riĉa sestaga prelegprogramo enhavos 25 kursojn el plej diversaj branĉoj de la scienco, kiujn realigos profesoroj el 12 landoj. Eblos sekvi kvin tiajn kursojn kaj krome aŭskulti dekojn da unuopaj prezentoj de sciencistoj el Norda kaj Suda Amerikoj, Eŭropo kaj Azio, kontraŭ tre modesta kongreskotizo de 30 germanaj markoj (22 500 LIT) ĝis la 31-a de julio, poste 50 GM (37 000 LIT). Turnu vin por pliaj detaloj al la Sekre-tariejo, Kleinenbergerweg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

Disaj vojoj en Eŭropo

En la januara numero de ĉi tiu revuo ni raportis pri esperantistaj iniciatoj en okcidenta Eŭropo. Regule tra la pasintaj ses monatoj venis reagoj, novaĵoj kaj novaj proponoj sur tiu kampo. Preskaŭ la sola komunaĵo inter ili estas la kredo, ke la ekonomia unuiĝo de Eŭropa Komunumo reliefigas la lingvoproblemon, tiel donante ekstran ŝancon al Esperanto. Kiel profiti de tiu ŝanco restas temo por arda diskuto. Jen superrigardo.

La projekto Erasmus: vera starto en Brajtono

Komence de la jaro Hans Erasmus (Nederlando) kaj Edward Symoens (Belgio) dissendis relative detalan kampanjo-skizon al Landaj Asocioj kaj aliaj aktivuloj. (Resumo troviĝas en la januara artikolo: temas pri informa kampanjo, edukeksperimento kaj internacia televidelsendo en 1991.) Jen iliaj komentoj pri la reagoj ricevitaj ĝis junio: “Ni ne proponas nun adapti la projekton, sed atendi ĝis la kongreso en Brajtono. Ni tamen ja volas konigi kelkajn ŝanĝojn kaj kompletigojn, kiujn ni opinias necesaj pro la reagoj.

“Unue ni samopiniis, ke la temposkemo devos esti ŝanĝita. Ni proponas prokrasti la menciitan televidelsendon ĝis la aŭtuno de 1992. Tio donos pli da prepartempo kaj ebligas la uzon de lernantoj kun du jaroj da sperto. Oni cetere povos peti la kunlaboron de TEJO-anoj, laŭ unu el la proponoj.

“Ni konsentas ankaŭ, ke la projekto devas esti kiel eble plej firme ligita al la LINGUA-programo de EK (la nova programo por stimuli la lernadon de fremdaj lingvoj). Tia ligo tamen ne estos facila, ĉar la programo principe celas la oficialajn lingvojn de EK.

“Tio portas nin al la konstato, ke diversaj laborgrupoj devos esti fonditaj. Oni povas pensi pri temoj kiel: ligo kun la LINGUA-programo, takso de la financaj avantaĝoj de komparebla programo en kiu funkcias Esperanto, la propedeŭtika valoro de Esperanto, kaj cetere preparoj por la televidelsendo, televidaj kursoj ktp. Ĉio ĉi estos grava diskuttemo en Brajtono.

“Unu el la plej gravaj paŝoj en la aŭtuno de 1989 devos esti la kunmeto de delegacio, kiu prizorgos kontaktojn kun la komisionoj pri edukado kaj kulturo de Eŭropa Parlamento kaj la Konsilio de Eŭropo. Nia opinio devus membri en tia delegacio minimume la jenaj homoj: H. Frank (FRG), J. Wells (Britio), H. Tonkin (Usono), U. Broccatelli (Italio), U. Seeler (FRG), E. Symoens (Belgio), J. Erasmus (Nederlando) kaj eventuale aliaj.

“Ni esperas ke okaze de la kongreso en Brajtono montriĝos sufiĉe da intereso por antaŭenigi ĉi tiun projekton.”

Ne ĉiu kredas je la valoro de tia projekto. Laŭ Jan Knappert (Britio; rektoro de la pasintjara IKU en Roterdamo), la tempo ne estos matura por vastskala instruado de Esperanto, ĝis la lingvo estos jam penetrinta ĉiujn kampojn de literaturo kaj scienco, per neregistaraj vojoj. Preben Bagger (Danlando) atentigas, ke la ĝisnunaj spertoj pri televida instruado de Esperanto (ekz. en Nederlando) kaj pri subitatakaj kampanjoj surbaze de racia argumentado lasas malmultan esperon pri sukceso. Krome li kredas ebla, ke la parolantoj de la malgrandaj EK-lingvoj vidos en Esperanto minacon al ilia rajto paroli kaj aŭskulti la propran nacian lingvon en la EK-instancoj.

Radikaluloj kaj verduloj – esperantista avangardo?

Dum la pli multaj esperantistoj sekvas la tradician vojon de premgrupo, celante influi registarojn kaj administrantojn, kelkaj provas konvinki difinitan politikan partion pri la valoro de Esperanto. En du kazoj tio alportas iom da sukceso.

Laŭ Emile Vaissaire, franca verdulo, inter 5% kaj 10% de la ĉeestantoj de la aprila konferenco de la Eŭropaj Verduloj scipovis Esperanton. Vaissaire plu komentas, ke estis neniu mencio dum la kongreso pri la lingvoproblemo, kaj ke la partia gvidantaro restas konvinkenda. La Eŭropaj Verduloj tamen preparis kaj dissendis sian elektoprogramon por la junia voĉdono ankaŭ en Esperanto. Se temas pri naciaj verdulaj partioj, ŝajnas ke la sveda kaj irlanda oficiale subtenas la instruadon de Esperanto. Alia franco, Emile Mas, kunorganizis Esperantan standon ĉe kelkaj aranĝoj de la ekologia movado kaj konstatis grandan intereson. Laŭ li la prezidanto de la francaj verduloj lastatempe konvertiĝis al Esperanto, kaj li atendas similan evoluon en la partio ĝenerale.

Pri la plejparte itala Radikala Partio kaj ties subsekcio “Esperanto” Radikala Asocio (ERA) ni raportis jam en januaro. En aprilo la partio okazigis sian 35an Kongreson en Budapeŝto. Tiu simbola gesto subtene al unuiĝo de la tuta eŭropa kontinento estis samtempe okazo por iom da transnacia pledado por Esperanto, kiun kunordigis ERA. Ottó Haszpra kaj Péter Rádós parolis Esperante en la Asembleo de la partio nome de Hungara Esperanto-Asocio. La sekva diskuto kondukis al rekomendo por faciligi la lernadon de Esperanto inter la radikaluloj – ĉar la esperantistoj en la partio estas ankoraŭ malgranda malplimulto. Ekster la kongreso, reprezentantoj de ERA kaj HEA interkonsentis proponi al la itala kaj hungara registaroj la uzon de Esperanto en ties oficialaj rilatoj.*

*En majo denove okazis ERA-manifestacio en Romo, kun 32 partoprenantoj. Interesatoj pri komuna, plurlanda manifestacio antaŭ naciaj televidstacioj la 14-an de oktobro 1989 skribu al Alberto Menabene, Via Monti Sibillini 3, I-00141 Romo.

LINGVOPROBLEMOJ

Inter 40 kaj 50 milionoj

Estas 321 milionoj da loĝantoj en Eŭropa Komunumo. EK havas naŭ oficialajn lingvojn – pli ol Unuiĝintaj Nacioj aŭ aliaj plej grandaj internaciaj organizaĵoj. Kaj tamen, interne de EK, inter 40 kaj 50 milionoj da indiĝenaj eŭropanoj parolas denaskan lingvon, kiu ne estas oficiala ĉeflingvo de la ŝtato en kiu ili loĝas. En nur unu membroŝtato (Portugalio) estas parolata neniu t.n. malpli uzata lingvo. En Francio oni parolas sep tiajn lingvojn, en Italio 12. Entute temas pri pli ol 30 lingvoj kaj pli ol 40 lingvaj komunumoj.

Tiuj lingvaj komunumoj estas divideblaj en kvar kategoriojn:

1. Popoloj kun nacia lingvo, kiu ne estas laborlingvo de EK (ekz. irlandanoj, luksemburganoj).
2. Popoloj sen propra sendependa ŝtato, kiuj loĝas en ŝtato kun alia oficiala lingvo (ekz. kimroj, bretonoj, friulanoj, frisoj).
3. Popoloj similaj al tiuj sub (2), sed kiuj loĝas en pli ol unu membroŝtato de EK (ekz. katalunoj, okcitanoj).
4. Popoloj kun lingvo, kiu estas ĉeflingvo en iu alia ŝtato sed ne en tiu, kie ili loĝas (ekz. germanlingvanoj en Belgio, franclingvanoj en Italio).

La Traktato de EK neniel aludas la malpli uzatajn lingvojn. Nur en 1979 grupo de parlamentanoj, laŭ iniciato de irlandano John Hume, proponis al Eŭropa Parlamento, ke ĝi garantii certajn bazajn rajtojn – ĉefe en edukado, komunikiloj kaj publika administrado – al la parolantoj de malpli uzataj lingvoj.

Laŭ la kutima procedo oni transdonis tiun proponon al “raportanto” (italo Gaetano Arfé), kiu post dujara esploro kaj kvar pliaj proponoj en la parlamento prezentis sian raporton. La 16-an de oktobro 1981 lia rekomendo estis akceptita per granda

Svarmas la sendependuloj

Unuopaj esperantistoj, kluboj kaj asocioj same naĝas en la tajdo de eŭropa unuiĝo. Ne malofte iu el ili lanĉas propran iniciaton. Tiel Esperantista Societo de Tenerife (Kanariaj Indsuloj) lastatempe dissendis alvokon por la sendado de leteroj al la franca parlamento, dum la sesmonata franca prezidado de EK. En la alvoko oni pledas por enkonduko de Esperanto en lernejojn, kaj por referendumo pri la lingva demando.

Esperanto-Centro de la Liona Regiono (Francio) sendis al ni raporton pri sia provo konvinki la francan edukministerion enkonduki Esperanton kiel lernejan fremdan lingvon. La respondo, malgraŭ bone preparita prezento, estis tute negativa. Necesas, laŭ konsilanto al la edukministro, aŭ gepatra postulo pri instruado de Esperanto, aŭ ĝia subteno per iu ĝenerala politika principo; kaj ĝis nun la principo estas "instruado de naciaj lingvoj sin apogantaj sur kulturo", unuavice de la okcidenteŭropaj. La Centro uzos tiujn respondojn kiel bazon de kampanjo en Francio por la instruado de Esperanto.

Ankoraŭ pli norde, "Espeurop" (Belgio) lanĉis propran kampanjon kun demandaro, kiu samtempe funkcias kiel petskribo, kaj ankaŭ glumarko (vd. apude). Oni celas premi la Eŭropan Parlamenton enkonduki la instruadon de Esperanto kiel "la plej bonan garantion por la longperspektiva konservo de nia lingva kaj kultura diverseco". Se juĝi laŭ la nacilingvaj informiloj, oni celas varbi subtenon precipe de neesperantistoj.

Anstataŭ konkludo

Se konkludon vi atendis el ĉi tiu artikolo – relegu ĝin! Estas nun tia kirlado de iniciatoj en Eŭropo, ke estus malsaĝe profeti iun rezulton. Permesu al ni tamen esprimi unu esperon: ke tiuj

esperantistoj, kiuj volas agi, pli arde klopodu trovi kunlaborantojn en aliaj landoj. Precipe pro tiu aspekto, UEA donas moralan apogon al la projekto de s-ro Erasmus (ĝia lanĉinto, cetere, kandidatis en la junia voĉdono por Eŭropa Parlamento: jen alia vojo por la movado...). Kaj jen fina komento: Se oni serioze volas kampanji, oni pensu serioze financi kaj kunordigi tiun kampanjon. Estas limoj al la ebloj de amatoreco, kiel ajn talenta kaj sindediĉa, kaj aparte kiam oni frontas la koloson en Bruselo kaj Strasburgo.

Mark Fettes



ADRESOJ: **Hans Erasmus**, p/a UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; **Emile Vaissaire**, 7 mas de la Marquisanne, F-83220 Le Pradet, Francio, aŭ **Asocio de Verduloj Esperantistaj**, p/a J.-C. Thumerelle, rue Pierre de Simpel 10, B-7790 Warneton, Belgio; **Ekologio kaj Esperanto**, p/a Emile Mas, F-46170 Castelnau Montratier; **"Esperanto" Radikala Asocio**, Via di Torre Argentina 18, I-00186 Roma, Italio; **Esperantista Societo de Tenerifo**, San Agustin 23, Apartado 53, EIC-38200 La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj; **Esperanto-Centro de la Liona Regiono**, 7 rue Major Martin, F-69001 Lyon; **Espeurop**, Van Elewijck 25, B-1810 Wemmel, Belgio.

voĉplimulto. Temis pri historia deklaro de la reprezentantoj de la eŭropa popolo, ke tiuj lingvoj estas rajthava parto de la eŭropa heredaĵo kaj ke oni volas konservi ilin.

En la sekva jaro oni akceptis malgrandan buĝeton por komenci la laboron – 100 000 EKU, aŭ ĉ. 250 000 gld. (En 1988 troviĝis unu miliono da ekuoj por la samaj celoj: ankoraŭ ne granda sumo, sed signifa paŝo antaŭen.) En majo 1982 okazis kunveno en Bruselo, kie estis fondita la nuna Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj.

La Buroo malfermis malgrandan oficejon en Dublino (Irlando) en 1984, kun tri oficistoj. Iom post iom ĝi starigis strukturon, kun komitatoj en naŭ el la dek du membroŝtatoj de EK. Krom EK, kiu subvencias konkretajn kaj difinitajn projektojn, finance

apogas ĝin la irlanda kaj luksemburga registaroj. Ekde 1990 ankaŭ la frisa provinca registaro en Nederlando donos subvencion.

Oni povas dividi la laboron de la Buroo en tri partojn:

1. Akiri leĝan kaj politikan subtenon por la malpli uzataj lingvoj, kunlabore kun komitato de la Eŭropa Parlamento.

2. Faciligi la interŝanĝon de informoj kaj spertoj inter la parolantoj de la malpli uzataj lingvoj. La gazeto de la Buroo aperas trifoje jare en la franca, itala kaj angla. Ĉiujare oni donas 70 subvenciojn por ebligi interŝanĝojn inter la diversaj regionoj en EK, de homoj kiuj aktivas pri malpli uzataj lingvoj.

3. Subteni studojn kaj provskemojn. Ĉirkaŭ kvinono de la tuta buĝeto por malpli parolataj lingvoj estas elspezata de la Buroo; Eŭropa Komisiono elspezas la ceteron por la projektoj de aliaj organizaĵoj, plej ofte rilate edukadon kaj lingvoinstruadon. La Buroo partoprenas en projekto por fondi komputilan informreton pri la malpli uzataj lingvoj. Ĝi eldonas mapojn de la regionoj en kiuj tiuj lingvoj estas parolataj. Estas ankaŭ aliaj projektoj.

Oni esperas ricevi pli formalan agnoskon de la Buroo flanke de Eŭropa Komunumo. La irlanda registaro eventuale aranĝos kongreson de la aŭtonomiaj kaj sendependaj registaroj en la landoj de EK, kiu pritraktos la malpli uzatajn lingvojn.

Kaj Esperanto? Estas simpatio al ĝi ĉe la nuna Buroo, inkluzive de ties unua prezidinto kaj nuna sekretario Dónall O' Riagáin (la supra teksto estas bazita sur parolado lia), kaj ankaŭ en pluraj el la regionaj movadoj (tiu por la bretona, ekzemple, de jaroj dissendas informojn ankaŭ en Esperanto). Se vi havas konkretajn proponojn pri tio, kiel Esperanto povas helpi al la laboro de la Buroo, skribu al la tradukinto de la ĉi-supraj informoj:

Liam O' Cuirc

14 Céide Ghleann Álainn Séipéal Iosóilde
Dublin 20, Irlanda Respubliko

Kelkaj minoritataj lingvoj en EK

albana	80 000 parolantoj (I)
alzaca	1 300 000 (F)
bretona	600 000 (F)
frisa	400 000 (NL)
friula	625 000 (I)
galega	2 300 000 (E)
irlanda	1 000 000 (IRL)
kataluna	6-8 000 000 (E), 200 000 (F)
kimra	500 000 (GB)
korsika	200 000 (F)
okcitana	1 200 000 (F), 50 000 (I)
sarda	1 350 000 (I)
skot-gaela	90 000 (GB)
slovena	150 000 (I)
vaska	700 000 (E), 100 000 (F)

(ciferoj de la Franca Komitato por Minoritataj Lingvoj)

Okdek jaroj portas fervojistojn al epoko de utiligo

Multaj fervojistoj-neesperantistoj kaj eĉ ĉefaj esperantistoj-
nefervojistoj estas surprizataj eksciant, ke en la horaro de la
ĉefaj fervojoj troviĝas klarigoj en Esperanto. Kaj ne temas
pri ununura escepta kazo. Jam en ok oficialaj ŝtataj horar-
libroj, esperantlingvaj klarigoj servas al pasaĝeroj sciantaj
Esperanton.

Krom tio, kelkaj el la plej gravaj internaciaj dokumentoj pri
fervojoj aperis en Esperanto (1-6). Fervojistoj posedas la plej
ampleksan fakan terminaron en Esperanto (7) kaj riĉan serion
da altnivelaj fakaj prelegoj (8) prezentitaj dum la kongresoj de
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio).

Oni povus do diri, ke la apliko de Esperanto inter fervojistoj
estus eĉ taŭga modelo por aliaj laborfakoj.

Zigzaga historio tamen portis rezultojn

La retrorigardo *IFEF-historio 1909-1984* (8) dividas la
historion de la fervojista movado en tri periodojn. La limojn de
la periodoj fiksas la finoj de la unua kaj dua mondmilitoj. Ĉar
la esperantistoj ĉiam staris en la frontlinio de pacaj kaj
kontraŭmilitaj streboj, dum anbaŭ mondmilitoj multegaj el ili
pereis. La postmilita movado devis do reviviĝi preskaŭ
dekomence, kaj kompreneble ankaŭ tiu de la fervojistoj.

Tiun ĉi dividon de la historio mi trovas prava kaj objektiva.
Tamen, ĝi ne estas la sola ebla divido. Se ni konsideras la
gravecon de Esperanto por unuopaj fervojistoj, kaj precipe ĝian
utiligon por fervojaj administracioj, ni alvenos al nova triperioda
divido:

- 1909-1949, kiun ni nomu “periodo de vojserĉado”;
- 1949-1989, kiu nomeblas ekzemple “periodo de rimedserĉado”;
- ekde 1989, ĵus komenciĝanta “periodo de praktika utiligo”.

La fervojiston movadon lanĉis alvoko en la revuo *Esperanto*
en marto 1909 fare de franca fervojisto Armand Berlande.
Sekve fondiĝis la “Internacia Asocio de la Esperantistoj-
Fervojistoj” (IAEF) dum la 5-a Universala Kongreso en
Barcelono. La juna organizaĵo komencis eldonadi la gazeton
Fervojista esperantisto kaj sufiĉe vigle agadi.

Dum la kvardekjara periodo ĝis post la fino de la dua
mondmilito oni faris multajn promesplenajn eksperimentojn sur
la kampoj de terminologio (9), eldonado de periodaĵoj (10) kaj
praktika utiligo de la lingvo (1, 11-12). Aliflanke la personaj
kontaktoj maloftis: la solaj regulaj aranĝoj restis IAEF-kunvenoj
kadre de la Universalaj Kongresoj.

La komencon de la dua periodo markis la kunvoko, en majo
1949, de la unua kongreso de la nova postmilita organizaĵo
IFEF. 149 partoprenantoj el ok landoj decidis, ke ekde tiam oni
ĉiujare aranĝu, krom renkontiĝoj dum la UK, ankaŭ memstaran
IFEF-kongreson kun riĉaj kultura, turisma kaj faka programoj.

De post tiam en la IFEF-kongresoj oni multfoje eksperimentis
pri la plej konvenaj rimedoj, montri al la profesia fervojistaro la
potencialon de Esperanto en pluraj internaciaj agadoj, en fervoja
tekniko kaj en administrado. Laboris elektitaj komisionoj, inter
kiuj precipe la terminara kaj fakprelega sekvis iomete zigzagan
vojon. La terminara komisiono klopodis trovi firman bazon,
elektante unue 2 000 terminojn el la franca *Lexique technique
ferroviaire*, plivastigante tion ĝis 5 000 kaj sekve ĝis pli ol 11
000 terminoj laŭ la faka terminaro de Unuiĝo Internacia de la
Fervojoj (UIC). Post vasta internacia diskutado helpe de
komputiloj, finfine ĉi-jare naskiĝis sub la gvido de G. Ritterspach
kaj la diligenta sinifero de H.D. Hartig la Esperanta versio de
la UIC-terminaro (7).

Denove duonmilo da fervojistoj ĉe labora kaj distra kongreso

La 41-an IFEF-kongreson en la kataluna urbo Salou (Hispanio)
markis la oficiala eldono de 228-paĝa *Fervoja terminaro*, kies
manuskripta finpretigo estis anoncita antaŭ unu jaro (*Esperanto*
1988/p.125; vd. ankaŭ la ĉi-kunan artikolon de Petr Chrdle).
Malgraŭ tio, ke la projekton oni akceptis jam en 1957, la vera
laboro okazis nur ekde 1978 kiam Dieter Hartig iniciatis
multobligitan interkomunikilon por tiu celo, *Terminara kuriero*.
Kunlaborantoj el dek kvin landoj kontribuis al la fina verko.
Vere eluzi ĝin nun fariĝas tasko de la diversaj landaj sekcioj:
eldoni dulingvajn terminarojn surbaze de la unulingva IFEF-
terminaro kaj la plurlingva terminaro de Unuiĝo Internacia de
la Fervojoj.

Al tre aktuala temo estis dediĉita la ĉefa faka prelego de la
kongreso: “Projekto pri fervoja kunligo per internacia ŝpuro
inter Francio kaj Barcelono”. Marti Guerrero sukcesis kateni la
atenton de la multnombra aŭskultantaro – entute pli ol 500
homoj el 23 landoj ĉeestis – per interesaj aŭtentaj informoj pri
la sekvoj de la decido de Hispanio akcepti la internacian ŝpuron.
La paneo de projekciilo, ne tiom ĝena en tiu kazo, preskaŭ
fiaskigis la rekorde ampleksan programaron “Aktualaĵoj el
diversaj landoj”. Finfine oni trovis anstataŭan projekciilon kaj
ĉiuj novaĵoj estis prezentitaj, el Francio, Norvegio,
FR Germanio, Pollando, Belgio, Aŭstrio, Svislando,
Jugoslavio, Danio kaj Ĉeĥoslovakio. Al vespera forumo venis



*Omaĝe al 80 jaroj de la fervojista E-movado parolis
(de maldekstre) G. Ritterspach, E. Henning Olsen, J. Giessner
kaj P. Chrdle.*

kvin lokaj hispanaj kolegoj, kiuj per la helpo de interpretisto
respondis la variajn demandojn de la kongresanoj.

La IFEF-komitato akceptis novan statuton, laŭ kiu IFEF povos
havi pli ol unu sekcion ene de unu ŝtato, se pro enlandaj
cirkonstancoj ne eblas tie starigi tutŝtatan asocion. La oficperiodo
por ĉiuj funkciuloj fariĝas tri jaroj. Kadre de la elektoj,
sekretario Otto Rüsemann (FRG) anstataŭis Romano Bolognesi
(I), dum IFEF-prezidanto Joachim Giessner (FRG) anoncis sian
venontjaran demision.

La fakprelega komisiono kelkfoje ŝanĝis siajn metodojn kaj regularon, celante pli efikan agadon. Ĝia ĉefa tasko estas elekti fake aktualajn temojn kaj certigi ties lingve altnivelan prezenton en la ĉiujaraj IFEF-kongresoj. Menciindas, ke ekde 1960 la Dokumenta Servo de la FRG-fervoja kompanio katalogas la prelegojn.

El la terenoj de kulturo kaj sporto mi menciuj almenaŭ la ĉiujarajn IFEF-skisemajnojn kaj literaturajn konkursojn pri la temo "fervojo" (13).

Celi uzon kiel internacia laborlingvo

Laŭ mi ni nun troviĝas komence de la periodo, kies tasko estas "praktika Esperanto-utiligo" en pli ampleksa kaj efika formo. La bazan direkton montras la unua priskribita periodo. Je ĝia fino ekstaris nova, sufiĉe forta organizaĵo, nome IFEF, kies celo estis jam dekomence klare formulita. La rimedojn donis la dua periodo, fine de kiu aperis la menciita E-eldono de la plej ampleksa ekzistanta fervojterminaro. Pliaj rimedoj estas la jam spertaj terminara kaj fakprelega komisionoj, la regulaj kontaktoj kadre de IFEF-aranĝoj kaj sukcesaj provoj utiligi kaj oficialigi Esperanton ankaŭ ekstere de la movado.

Tiurilate elstaras, apud la uzo de Esperanto en horaroj kaj la citado de prelegoj en la faka literaturo, ĝia enkonduko kiel laborlingvo dum sciencaj kaj teknikaj konferencoj – unue samrajte kun naciaj lingvoj, sed kun la celo fariĝi la unusola lingva komunikilo.

Epokfaran paŝon faris do la konferenco "Modernaj fervojaj elementoj kaj ilia provado", aranĝita en Pardubice (Ĉeĥoslovakio) en oktobro 1988 fare de Fervoja Esplorinstituto Prago. Apud la prelegoj en tri naciaj lingvoj estas prezentitaj ankaŭ kvin altnivelaj prelegoj en Esperanto. Dum la tuta konferenco estis interpretado en Esperanton kaj el ĝi en la aliajn lingvojn. Por tiu celo la Konferenca Servo de la Internacia Organizaĵo de Ĵurnalistoj devis dungi spertan esperantiston

rekomenditan de ĈEA. Post la konferenco tiu homo restas sur la listo de disponeblaj profesiaj interpretistoj, tiel ke ankaŭ estonte oni povos prizorgi Esperantan-ĉeĥan interpretadon.

Petr Chrdle (Ĉeĥoslovakio)

BIBLIOGRAFIO

1. *Internacia kontrakto pri fervojaj transportaĵoj de la 14-a de oktobro 1890* (Konvencio de Bern). Trad. Reuss. 1911.
2. *Internaciaj konvencioj pri fervojaj person-, pakaĵ- kaj frejt-transporto*. Řebíček, J. MEP, 1930.
3. *Internacia konvencio pri la fervoja pasaĝer- kaj pakaĵtransporto (CIV)*. Barnickel, W. IFEF, 1967.
4. *Internacia konvencio pri la fervoja vartransporto (CIM)*. Županič, J. kaj L. Sekereš. JAFE, 1968.
5. *Ĝeneralaj transportkondiĉoj el la internacia trafiko por transporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (TCV)*. Narvallo. 1978.
6. *Unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de pasaĝeroj kaj pakaĵoj (CIV)*. Bernhard. Ludwigshafen: 1987.
7. *Fervoja terminaro*. Ĉefred. G. Ritterspach. Mainz: IFEF, 1989.
8. *IFEF-historio 1909-1984*. Giessner, J. k.a. Herzberg: IFEF, 1984.
9. *Eisenbahn-Wörterbuch Deutsch-Esperanto*. Habellok, G. Breslau: 1923.
10. La organo de la internacia fervojista movado nomiĝis sinsekve: *Fervoja esperantisto* (1910-22), *La fervojisto* (1923-39), *Bulteno* (1949-57), *La internacia fervojisto* (1958-69) kaj *Internacia fervojisto* (1970 ĝis nun).
11. *Konversacia kajereto*. Řebíček, J. Fervoja Direkcio Olomouc, 1921.
12. *La novaj fervojoj tra Aŭstria Alpoj*. Wien: Reĝa Ministerio por Fervojaj Aferoj, 1922.
13. *La verda relo*. Beleta antologio pri la fervojo. La Chaux-de-Fonds: LF-koop., 1981.

Apud la faka kaj organiza laboroj, variaj distraĵoj – bankedo kaj balo, arta kaj folkloro vesperoj, filmprezentado kaj ekskursoj – zorgis pri agrabla etoso. La publikon informis ekspozicio en la urbocentro kaj fruktodona gazetara konferenco. Funkciis libroservo, kaj kongresan poŝtstampon kaj unuatagan koverton oni povis akiri dum du matenoj.

G. Ritterspach (FR Germanio)



La 42-a kongreso de IFEF okazos en Hamar, Norvegio, de la 2-a ĝis la 8-a de junio 1990.

Jam aperis E-prospekto kaj E-vidbendo pri la urbo, kaj provizora programo estas havebla.

Skribu al: 42-a IFEF-kongreso,
Karudveien 1, N-2340 Løten, Norvegio.

JUS APERIS LA TRIA ERO EN LA JUBILEA KOLEKTO DE UEA!



"Tiu ĉi libro estas unu el malmultaj ĉefverkoj de la esperantologio, de Esperanto entute kaj, mi ne dubas, ĝi fariĝos klasikaĵo ankaŭ en la digna literaturo de la ĝenerala lingvistiko."

PAUL NEERGAARD

Dua, korektita eldono: Jubilea Kolekto n-ro 3.
450p. Bindita. Mendo de la Libroservo de UEA:
48,00 gld. plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3 ekz.

Ekde 1989: la Monato de Internacia Enketado

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) volas lanĉi novan movadan tradicion. Februare ni festas la Semajnon de Internacia Amikeco (SIA); ni volas proklami *septembron* la Monato de Internacia Enketado.

De jaroj G. Pirlot (Belgio) kompilas internacian statistikon pri la leĝa bazo por ĉiunivela instruado de Esperanto tra la mondo, kaj ankaŭ pri la aktuala stato de universitataj kursoj. La katalogado de universitataj disertacioj estas prizorgata de lia samlandano E. Symoens, kiu lastatempe publikigis la ĝisnunajn rezultojn en libro eldonita de UEA.* Tiujn informojn ILEI deziras kompletigi sur la tereno de antaŭ-universitata studado, t.e. la instruado de Esperanto en elementaj kaj mezaj lernejoj.

Por plenumi tiun taskon, ILEI aperigos en sia organo *Internacia pedagogia revuo* (IPR) kaj en la lerneja revuo *Juna amiko* demandilon, kiun ĝi ankaŭ sendos kvante al siaj landaj sekcioj, aŭ al edukaj respondeculoj en landaj asocioj. La respondojn ĝi deziras ricevi antaŭ la fino de decembro, por povi aperigi rezultojn antaŭ la fino de la priraportata lerneja jaro.

Pasintan septembron ILEI unuafoje lanĉis la enketadon, sed nur kun modera sukceso. Detalaj rezultoj aperis en *Juna amiko* 1989/2, kaj post la alveno de pluraj malfruaj respondoj denove en IPR 1989/1. Entute 18 landoj respondis, el kiuj Jugoslavio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio kaj Hungario plej detale. La informojn el Hungario ni listigis aparte, ĉar tiu estas la sola lando, kie la enlanda instanco mem sisteme kompilas superrigardon. Por resumi ĝian detalan statistikon, temas pri 156 kursoj, el kiuj 27 estas oficialaj: 98 en elementaj lernejoj,

17 en mezlernejoj, 8 en universitatoj kaj 33 ceteraj. La tuta nombro de lernantoj estas 2551. La respondoj de la cetera mondo koncernis 83 kursojn el kiuj nur 22 oficialajn, kun ĉ. 1430 lernantoj (el kiuj nur ĉ. mil estas lernejoj, ĉar ni ricevis plurajn raportojn pri plenkreskaj kaj miksaĝaj grupoj).

La malalteco de la ciferoj spegulas malfortan reagemon (landoj kiel Ĉinio kaj Bulgario apenaŭ raportis sed instruas milojn). Kaj la ciferoj estas krome alarmiloj pri la nekontentiga stato de lerneja instruado, nome, ke la plimulto de la instruado estas hobia, okazanta ekster formalaj lernejaj horoj, foje kun nepagataj instruistoj.

Ni do alvokas ĉiujn festi kun ni la MIE. Landaj movadoj alprenu la taskon enketi ĉiuseptembre, uzante la ILEI-demandilon. En kelkaj landoj oni jam venis al la ideo multobligi nian enketilon por enlanda distribuo, eventuale aldonante kelkajn demandojn. Tiumaniere la ensenditaj rezultoj pasas tra la mano de landa respondeculo, kiu estas tuj bone informita. Ĉiu, kiu instruas Esperanton lerneje, nepre akiru enketilon kaj resendu ĝin plenskribitan al ILEI aŭ al sia landa instanco. Ĉiu, pri kiu pasintjare jam aperis informoj, bonvolu indiki ĉu la informoj plu validas, kaj se ne indiku ŝanĝojn. Redaktoroj pretaj aperigi nian demandilon bonvolu peti ĝin de ILEI dum la Universala Kongreso, ekzemple ĉe la Tago de la Lernejo.

Kiu volas ricevi la numeron de IPR kun la rezultoj, bonvolu sendi 4 irk al GCA, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; aŭ, pli bone, membriĝu en ILEI, sendante 40 svedajn kronojn al Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio (pĉk. 682117-7 Stockholm). Membriĝo inkluzivas jarabonon al IPR.

Stefan MacGill (Hungario)

* *Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko* (27,00 gld. de la Libroservo).

KOMISIONOJ

Por tutmondiĝo de la virina agado

La tri celoj de la Internacia Jardeko por la Virino, “paco, egaleco, evoluo”, ekde Internacia Virina Jaro (1975) trovas eĥon en la Esperanto-movado. La UEA-Komisiono por Virina Agado (KVA) de post tiam strebas helpi al la virinoj-esperantistoj, konigi al la mondo la sociajn problemojn de la virinoj kaj strebi al ties solvo. Nia agado estas malfacila, ĉar la esperantistoj vivas sub malsamaj vivkondiĉoj kaj je diversaj niveloj sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj.

Inter 1979 kaj 1987 aperis la revuo *Sekso kaj egaleco*, redaktata de Anna Brennan. Ĝi publikigis novaĵojn pri virina agado ĉirkaŭ la mondo, artikolojn kaj leterojn el multaj landoj. En 1981, post internacia semajnfina renkontiĝo en Roterdamo, KVA starigis reton de 69 kunlaborantinoj el 40 landoj. Ili helpis en urĝa disdono de E-demandilo pri la vivo de virinoj tra la mondo, kies rezultojn oni poste publikigis en la japana ĵurnalo *Manaiti simibun*. Okazis ankaŭ diskutoj pri la internacieco de KVA. Pluraj ĝiaj kunlaborantoj skribis profunde pri la signifo por ili de la virina agado en kaj ekster la movado. En 1982 KVA petis informojn pri la historio kaj celo de Internacia Tago de la Virino en la diversaj landoj, kaj artikoloj pri tiu temo aperis i.a. en la revuoj *Sekso kaj egaleco*, *Paco*, *Ankoraŭ sennoma gazeto* (Japanio) kaj *La esperantista laboristo* (Francio). KVA-

kunlaboranto preparis gvidilon pri la verkado de tiaj artikoloj.

KVA ankoraŭ regule organizas kunsidon kaj publikan kunvenon ĉe la Universalaj Kongresoj, ofte kun prelegoj kaj diskutoj. En 1983 kaj 1988 okazis internaciaj seminarioj, respektive en Bulgario kaj Svedio, kun tre bonaj rezultoj [red.: vd. *Esperanto* 1983, p.162-3, kaj 1988, p.128-9]. Kunlaborantoj de KVA partoprenis en diversaj neesperantistaj agadoj kaj konferencoj, inkluzive de la Monda Virina Konferenco en Najrobi (1985) kaj la Monda Virina Kongreso en Moskvo (1987).

Je loka kaj landa niveloj, la Komisiono por Virina Agado helpis aktivigi homojn en pluraj landoj. Krom la menciita enketo por *Mainiti simibun*, japanaj kunlaborantoj produktis 12 japanlingvajn numerojn de *Sekso kaj egaleco* inter 1980 kaj 1983. Svedoj aranĝis Esperantan budon ĉe ekspozicio en Gotenburgo, “Virinoj kapablas” (1984). Bulgaroj partoprenis la landan pacagadon, i.a. lige kun la Virina Komisiono de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kaj ankaŭ en la triamonda okulhelpa agado de la nederlanda esperantista organizaĵo Agado E3.

Vojo por la estonteco

En Roterdamo pasintjare Kimie Markarian parolis pri la virina E-agado en Japanio. Ŝi kaj Sasaki Yasuko – membroj de la E-virina asocio en Japanio – promesis eldoni novan revuon, *Esperantista virina agado*, kaj ĝi aperis decembre 1988 en Esperanto kaj la japana. En ĝi estas artikoloj de aŭtoroj el

Finfine ne temas pri transitiveco

En la marta numero de *Esperanto* estis tri reagoj al la artikolo de Golden, aperinta en la novembra numero de la antaŭa jaro. Kun ĉiuj reagintoj mi parte, sed malsamgrade samopinias.

Kun Alan Towsey mi konsentas pri la graveco de la principo pri neceso kaj sufiĉo, sed tie finiĝas la konkordo. Kun J. Kavka mi konsentas pri la aposterioreco de Esperanto. Kun Norman Lock mi konsentas, ke la grava punkto ne estas striktasence la transitiveco en si mem. Tiun ideon mi nun intencas disvolvi.

Precipe gravas la rilato subjekto-verbo

Oni kutime difinas verbon kiel transitivan, se ĝi havas rektan komplementon, kaj kiel netransitivan, se ĝi ne havas rektan komplementon. Laŭ tiu difino mi povas netransitive manĝi, aŭ mi povas transitive manĝi panon.

La fakta rilato inter “mi” kaj la verbo estas tamen la sama en ambaŭ kazoj. Gramatike ĝi esprimiĝas kiel rilato inter subjekto (“mi”) kaj predikato (“manĝas”). Por tiu rilato estas sensignife, ĉu la verbon akompanas rekta komplemento. En la ekzemploj de Alan Towsey pri transitiva kaj netransitiva uzo de la verboj *afekti*, *bati*, *blovi*, *cedi*, *dolori*, *venĝi* laŭ mia kompreno la fakta rilato inter la subjekto kaj la verbo estas la sama.

Ni analizu nur du ekzemplojn:

1. “Bati hundon” kaj “Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile”: En la dua, netransitiva frazo la rilato inter la subjekto *koro* kaj la verbo *bati* estas la sama kiel tiu inter la subjekto (ne specifita) kaj la verbo en la transitiva frazo “bati hundon”. La rilato inter *bati* kaj *hundon* estas tute alia.

diversaj landoj. Eble ni povos estonte uzi ĉi tiun gazeton kiel internacian organon de KVA. En Roterdamo M. Taŝeva sugestis, ke KVA devas helpi al esperantistinoj en Afriko, aktivigi ilin. Estas domaĝe, ke en la UK-oj de Varsovio kaj Roterdamo partoprenis nur viroj el Afriko. Krome, nekompareblajn malfacilaĵojn travivas virinoj en iuj landoj, precipe en la tria mondo – Afriko, Azio kaj Latina Ameriko. Jen unu grava tasko por KVA. Tiuj, kiuj interesiĝas kaj deziras helpi la virinan agadon en Latinameriko, Azio, aparte Ĉinio, anoncu sin. En ekz. Kolombio kaj Brazilo ni havas aktivajn kunlaborantojn: helpu al ni plivastigi nian reton!

Okazos seminario en FR Germanio ankoraŭ ĉi-jare, kiun organizas la prezidanto de KVA E. Bormann. Dum la virina kunveno en la 74-a UK en Brajtono estos prelego: “La rolo de la virino por atingo de la paco.” Ni invitas ĉiujn ĉeestantinojn partopreni la virinan kunsidon, kie oni pridiskutos la agadplanon kaj elektos novan komisionon pri virina agado. Kaj ni petas anticipi viajn proponojn kaj opiniojn pri nia E-virina agado en la tria mondo kaj tutmonde.

Maria Taŝeva
(kunordiganto de la virina agado por Afriko)
Bloko 620, Vh. b, Ap.54
BG-1336 Sofia, Bulgario

Viajn ĝeneralajn reagojn sendu al: *Elsbeth Bormann* (prezidanto de KVA), *Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio*.

2. “Blovi trumpeton” kaj “La vento blovas”: La vento de la netransitiva frazo estas pli kompareble al la ne-specifita trumpetanto de la transitiva frazo ol al la *trumpeto* mem.

Rigardante nun la aliajn ekzemplojn proponitajn de Alan Towsey – *boli*, *komenci*, *fermi*, *ruli* kaj eĉ *bani* – kaj komparante ilin kun la ĉi-supraj, ni konstatas, ke en ĉi tiuj kazoj la fakta rilato inter la subjekto kaj la verbo ŝanĝiĝas en la netransitiva frazo. Ni prenu la ekzemplon “Li fermis la pordon” kaj “La pordo subite *fermis post li”. La subjekto *pordo* de la dua frazo havas la saman rilaton al la verbo *fermi*, kiel havas, ne la subjekto sed la *rekta komplemento* de la transitiva frazo.

La diferenco inter tiuj du manieroj sintakse esprimi la saman faktan rilaton (ĉi-kaze la fermon de la pordo) estas konata kiel la diferenco inter aktiva kaj pasiva voĉo. Karakteriza por la pasiva voĉo estas, ke la elemento, kiu en aktiva frazo estas rekta komplemento, ricevas la ĉefan atenton, plenumante la funkcion de subjekto. La subjekto de la aktiva frazo – la t.n. “aganto” – estas malgrava, sed oni povas ĝin esprimi, en Esperanto per la propozicio “de” (aŭ “far”).

Strategioj por la esprimo de pasiva voĉo

Kvankam la aganto estas malgrava en la pasiva voĉo, oni en multaj lingvoj preferas uzi tiun voĉon nur tiam, kiam la aganto estas *identigebla*. Unu faktoro, kiu klarigas tiun preferon, eble estas, ke en multaj lingvoj la pasiva voĉo esprimiĝas iom peze, per helpverbo kaj participo. Eĉ en la latina lingvo, kiu posedis pasivan konjugacion, helpverbo kaj participo necesis por la pasiva voĉo en kelkaj verbaj tempoj. Aliaj lingvoj – ekz. la latinidaj, slavaj kaj skandinaviaj – havas je sia dispono partikulon evoluintan el t.n. refleksiva pronomo, kiu ebligas esprimon de la pasiva voĉo sen supozigi la ekziston de aganto. Por tiu celo Esperanto havas la sufikson *-iĝ-*. Oni komparis tiun esprimmanieron kun la mediala voĉo de la greka lingvo. Pri la praveco de tiu komparo mi tamen ne estas kompetenta juĝi, ĉar mi ne konas la grekan lingvon nek spertis la naturon de la mediala voĉo.

Sed la *anglan* lingvon mi konas, kaj ĉar la defendantoj de la forigo de la distingo inter transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto (Golden kaj Towsey) estas denaskaj anglalingvanoj, ŝajnas al mi utile esplori, kiujn esprimilojn posedas tiu lingvo por doni la ĉefan atenton al la aktiva rekta komplemento kaj samtempe ne indiki la eblecon, ke estas aganto (aktiva subjekto).

La pasiva voĉo ne estas trafa, ĉar ĝi ja indikas tiun eblecon. Ŝanĝo de la vortordo ne eblas, unue ĉar la anglalingva subjekto pli-malpli devas antaŭi la verbon en asertaj frazoj, due ĉar en la angla lingvo, male kiel en la slavaj kaj la plimulto de la latinidaj lingvoj, necesas eksplicita subjekto. Oni eĉ diras “ĝi pluvas”. Sufikson similan al la Esperanta *-iĝ-* la angla lingvo ne posedas, nek refleksivan pronomon facile manipuleblan. Refleksivecon oni esprimas en la angla lingvo per pronomoj, kiuj enhavas morfemon signifantan “mem”. Tiuj pronomoj tre taŭgas por esprimi *veran* refleksivecon, t.e. identecon de subjekto kaj komplemento, sed ili absolute ne taŭgas por esprimi pasivecon sen aganto.

Al la angla restas do la strategio, ke malaperu el la signifo de verboj indiko pri ilia rilato al la subjekto. Tiun gramatikan sistemon, kiun Golden kaj Towsey supozeble proponas apliki al Esperanto, oni povas simpligite priskribi jene: Se la frazo enhavas du substantivojn sen prepozicio, la unua estas subjekto kaj la dua estas rekta komplemento. Se ĝi enhavas nur unu substantivon (aŭ substantivan pronomon), tiu devas plenumi la funkcion de subjekto. La faktan rilaton inter tiu substantivo kaj la verbo oni devas dedukti el la kunteksto. Tial oni diras ne nur “li fermis la pordon” kaj “la pordo *fermis post li”, sed ankaŭ “la kolportisto vendis la libron” kaj “tiu libro *vendas bone”!

Ĉu tiu strategio faciligus Esperanton? Laŭ mia opinio, nepre ne. Esperanto havas pli liberan vortordon de la angla (i.a. ĉar ĝi posedas akuzativan kazon), kaj krome ĝi havas la sufiksojn *-iĝ-* (por ŝanĝi la rilaton rekta komplemento/verbo en rilaton subjekto/verbo) kaj *-ig-* (por ŝanĝi la rilaton subjekto/verbo en rilaton rekta komplemento/verbo). Estus do superflue forigi el la verbaj signifoj indikon pri iliaj rilatoj al la subjekto. Tio kompreneble kaŭzas ioman ĝenon al anglalingvanoj kaj iuj aliaj, kiuj devas alkutimiĝi al la fakto, ke verba signifo konsistas ne nur el indiko de ago aŭ stato, sed ankaŭ el la eblaj gramatikaj rilatoj de la verbo. Sed, kiel prave asertis Claude Piron en kunveno dum iu UK, nur en tiuj okcidenteŭropaj lingvoj oni malfacile distingas inter “komenci” kaj “komenciĝi”. Slavlingvanoj, ekzemple, tute ne havas malfacilaĵojn tiurilate.

Kriterioj por facileco

Riskante trolongigi ĉi tiun artikolon, mi ŝatus fini per kelkaj vortoj pri mia lingvistika kredo. Estas ĝenerale akceptite, ke la sumo de la signifoj esprimitaj ne egalas al la mesaĝo, kiun la parolanto intencas komuniki. Lingvo, kiu posedus ĉiujn signifojn necesajn por precize esprimi ĉiujn eblajn mesaĝojn, estus lingvo ekstreme malfacile manipulebla (vd. la Zamenhofan averton kontraŭ la ideo de plena E-gramatiko en *Lingvaj respondoj*). La lingvo estas la ilaro, per kiu ni devas nin helpi por kiel eble plej trafe komprenigi nin, sed restas forta elemento de problemsolvado. La parolanto devas – samkiel verkanto de krimromano – elmeti la spurojn tiel, ke la aŭdanto povu deĉifri la mesaĝon, konsiderante ne nur la signifojn mem, sed ankaŭ la manieron, en kiu ili estas kombinitaj en kuntekston (lingvan kaj eksterlingvan), la scion komunan al la parolanto kaj la deĉifranto, ktp, ktp. En tiu interagado oni devas uzi la ilaron, kiun oni havas je sia dispo, do la aĉetitan porkidon, laŭ Kavka kaj Pumpr. Esperanto havas sufiĉe da ilaro por ne lasi al la aŭdanto la deĉifradon de la fakta rilato inter verbo kaj substantivo.

Otto Prytz (Norvegio)


La kuba movado viglas kulture kaj organize

La 22-an de aprilo ĉi-jare okazis io vere rimarkinda en Kubo, komparebla kun la Esperanta eldonado de la fremdlingva eldonejo “José Martí” aŭ kun la E-elsendoj de Radio Havano – ĉar unu el la plej gravaj kulturaj institucioj en la lando akceptis la fondon de Esperanta sekcio.

La kampanjo ĉe la Nacia Unio de Verkistoj kaj Artistoj de Kubo (UNEAC) komenciĝis per prelego en la 1-a Renkontiĝo de Literaturaj Tradukistoj de Kubo en 1987. Tie Arnoldo Aguila pritraktis la temon “Eblecoj disvastigi la kuban literaturon en Esperantujo”, unuafoje en tiu medio. Ekzistis jam la precedento de la Tradukista Esperanta Rondo, starigita de la fondinto kaj eksprezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, Andrés Rodríguez. Al tiu la preleganto aldonis la koncepton “metiejo”, profitante la kuban praktikon disvolvi novajn literaturajn talentojn pere de “literaturaj metiejoj”. Ja laŭ la kubana kompreno oni ĉizas, tajlas, demetas, poluras kaj formas esprimojn same kiel metiisto uzas siajn ilojn.

Poste, kadre de la Sekcio pri Tradukado de UNEAC, prezentiĝis alloga ŝanco fondi la rondon “Esperanta Literatura Traduk-metiejo”, kaj oni ĝin kaptis per ambaŭ brakoj. Laŭ nia sperto kiam rondo ne havas konkretajn celojn ĝi transformiĝas en sociajn renkontiĝojn. Tiu ĉi do celas ne nur lernadon sed ankaŭ aplikadon, traduki ion tradukindan sub kolektiva kontrolo kun celo publikigi la verkon. Ĝi konsistas el subgrupoj esperantlingva, hispanlingva kaj por kolektiva lernado. La dividoj ne absolutas; tamen ili kunportas, ke ĉiu subgrupo kaj ĉiu membro laboras por konkretaj celoj.

Ne nur la atingo de tia aŭspicanto kaj la uzo de tia labor-metodo ŝajnas al mi imitindaj. Gravus la ĝenerala principo de



Unu el la Esperanto-subgrupoj kunsidas (meze: A. Aguila): oni neniel celas krei novan skolon.

toleremo inter la membroj de la tradukmetiejo. Malgraŭ tio, ke mi opinias min mem “danĝera lingva revoluciulo”, mi mirakle toleras la aliajn, multe pli mens-sanajn, kaj – eĉ pli mirakle – ili eĉ kapablas paroli kun mi. Ni rifuzas la ideon “samideano”, ĉar en Esperantujo neniu havas la saman ideon pri preskaŭ io ajn. Ni preferas la vorton “kunproponanto”, ĉar ni ja kunproponas Esperanton, eble iom malsaman por ĉiu el ni sed tamen sufiĉe similan. La tradukmetiejo ne celas formi “skolon” kaj toleras ĉiun ajn artan vidpunkton ene de si mem.

En la fondotago oni elektis Andrés Rodríguez kiel Esperantan konsilanton, ĵurnaliston José Antonio García kiel hispanlingvan konsilanton, kaj anon de la Plenuma Sekretariato de UNEAC, José René Fernández, kiel organizanton. Ni do jam disponas pri ĵurnalisto kaj verkisto nacie konataj, tradukistoj publikigitaj, la unusola E-lingva kontrolisto de la eldonejo “José Martí” kaj aliaj promesuloj.

Oni bonvenigos ĉian helpon adresitan al la sidejo de la tradukmetiejo ĉe UNEAC: Taller de Traducción Literaria del Esperanto, Asociación de Escritores UNEAC, Calle 17, #351 esq. a H, Vedado. C. de la Habana, Kubo.

Arnoldo Aguila

Nia kuba movado ekestis en urba biblioteko en la jaro 1979, kaj ĉiam lernejoj estis la kerno kie estiĝis novaj esperantistoj. Nuntempe ni havas pli ol 14 lernejojn tutlande.

Unue ne ekzistis asocia vivo: oni prioritatis la rolon de propagando kaj instruado. La unuan grandan kunsidon ni plenumis kadre de la 3-a Internacia Libro-foiro en Havano, 1986, kiam la asocio prezentis libro-standon kaj organizis Teknikan Konferencon Esperantistan. Gravan paŝon al plua disvolvo signifis la Unua Kongreso de KEA, 4-6 decembro 1987, kie kunvenis unuafoje ĉ. 600 esperantistoj. Kelkaj eksterlandaj esperantistoj vizitis nin, inter ili Ottó Haszpra, estrano de UEA, Simo Milojević, ĝenerala direktoro de UEA, Detlev Blanke el GDR kaj metodikisto Marin Bacev el Bulgario. La Jubilea Jaro estis ege sukcesa por ni el propaganda vidpunkto: rezultis pli da ŝtata subteno, ĉefe morala, kiu siavice kontribuis atingi E-elsendon per Radio Havano Kubo kaj okazigon de la internacia konferenco Esperanto '88. Ankaŭ nia invito al Universala Kongreso kompreneble baziĝis sur tiu ŝtata sinteno.

Dum Esperanto '88 ni trairis novan vojon al konatiĝo kun regionaj esperantistoj, nome el Brazilo, Kolombio kaj Meksikio, ĉar unuafoje ni kunsidis por interŝanĝi spertojn pri la respektivaj landaj movadoj kaj starigi kunlaborajn rilatojn. Ni rimarkis nian fortan potencialon por krei amasan E-movadon ĉi-kontinente, kiun ĝis nun malhelpis nia izoleco. Problemoj rilate informfluan kaj materialajn rimedojn fontas el nia “triamonda” karaktero. Tial la landaj reprezentantoj kunvenintaj en Havano konsideras maloportuna la dividon de nia kontinento. El pluraj kunsidoj estiĝis baza dokumento por kunlaboro inter amerikaj landaj organizaĵoj, kiun oni nun submetadas por kolektiva decido al tiuj landaj asocioj kiuj ne povis partopreni la eventon.

Tiacele Radio Havano Kubo povas fariĝi ĉiesa tribuno por plia interrilato kaj fortiĝo. Fakte ni esperas pliajn kuraĝigajn atingojn, ne nur ĉi-lande sed ankaŭ regione. La ĉi-kontinenta movado bezonas pli da atento, ĉar individuoj kaj asocioj plej ofte agas tute izolaj, eĉ premataj de malfacilaj vivkondiĉoj rilate pagajn kaj transpagajn problemojn.

En Kubo la movado ĉiusence maturiĝas, oni serioze lanĉis informan laboron, entreprenas socian kaj kulturan agadojn enhavantajn nekalkuleblan potencialon, kaj ĉefe ni laborigas novajn aktivulojn. La 75-a UK en Havano ne nur portos multajn gastojn al ni, sed ebligas al ni koncentri niajn laborojn por konkreta celo, ke ĉiu kongresano sentu sin hejme ĉe ni.

Maritza Gutiérrez

75-a UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO, Havano (Kubo), 14-21 julio 1990

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

**Adreso de LKK: Kuba Esperanto-Asocio,
Apartado postal 2018, 10200 La Habana 2, Kubo**

Jubileo (denove): La 75-a Universala Kongreso de Esperanto denove prezentas okazon jubilei, t.e. kongresi la 75-an fojon post la 1-a UK okazinta antaŭ 85 jaroj en 1905.

Alta Protektanto: Tiun honoran postenon volonte transprenis prof. d-ro Carlos Rafael Rodríguez, vicprezidento de la Respubliko kaj vicprezidanto de la registaro de Kubo. Li estas plej elstara nuntempa kuba intelektulo, doktoro pri juro, kiu habilitiĝis pri sociaj sciencoj, politikologio kaj ekonomiko, okupis plurajn ministrajn postenojn, estis ĵurnalisto, verkis multajn librojn, estas la ĉefa kuba diplomato, vaste konata ankaŭ internacie.

Kongresejo: La 75-an UK gastigos la impona Kongresa Palaco, moderna arkitektura verko, plene klimatizata, riĉe ekipita, kun aro da taŭgaj salonoj en ĉiuj grandecoj, kun poŝto, banko, vendejoj, bufedoj, restoracioj, ĝardenoj, kaj vastaj kaj komfortaj vestibloj. Ĉiuj kongresaj aranĝoj okazos en tiu admirinda atingajo de la nuntempa konstruaro.

Klimato: Ne necesas timi la kuban klimaton. Kvankam la lando estas je la samaj latitudoj kiel Saharo, ĝi ja estas insulo, kaj Havano estas haveno mara, kun iom da vento kaj eĉ pluvo dum la kongresa periodo. Ni siatempe konsilos al vi kiajn vestaĵojn porti, sed jam nun sciu, ke ili estu kiel eble plej malmultaj kaj praktikaj.

Loĝado: Havano havas multajn komfortajn hotelojn, plej ofte klimatizatajn. Ni jam rezervis sufiĉan kapaciton en diversaj prezkategorioj. Por via orientiĝo jen proksimumaj prezoj, kiuj inkluzivas: tranokton, matenmanĝon, transporton de kaj al la flughaveno kaj ĉiutage de la hotelo al la kongresejo (matene) kaj reen (vespere). La prezoj estas por unu persono kaj por unu tranokto. Luksaj hoteloj: unulita ĉambro 90 guldenoj, loko en dulita ĉambro 70 gld. Turismaj hoteloj: unulita ĉambro 65 gld., loko en dulita ĉambro 50 gld. Studenta domo: loko en dulita ĉambro 33 gld. Loka Kongresa Komitato faras klopodojn organizi ankaŭ amasloĝejon, sed detaloj pri tio ne estas nun haveblaj.

Ekskursoj: Multaj ekskursoj estas en preparo: dumkongresaj (duontagaj, tuttagaj, vesperaj), post- kaj antaŭkongresoj. Ĉar ankaŭ la TEJO-Kongreso okazos en Kubo (7-13 julio), tre verŝajne eblos aliĝi al ĝi kiel al la Antaŭkongreso kaj pasigi trankvilan semajnon ĉe rava strando de lazura tropika marbordo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Flugvojaĝoj: UEA organizos plurajn flugkaravanojn per diversaj flugkompanioj. Kelkaj el ili inkluzivos ankaŭ vizitojn al najbaraj landoj kaj regionoj. Ni provas definitivigi tiujn aranĝojn por anonci ilin frue en septembro.

Aliĝilo kaj Unua Bulteno: Ambaŭ jam aperis kaj distribuiĝis al ĉiuj individuaj membroj de UEA (kun la Jarlibro kaj Gvidlibro). Intertempe ankaŭ la kongresaj perantoj ricevis ekstrajn kvantojn. Atentu speciale favoran aliĝperiodon ĝis la 15-a de aŭgusto 1989.

Kongresa temo: La temo de la 75-a UK estos “Esperanto, evoluo, kultura diverseco”. Oni antaŭvidas dediĉi apartan atenton al la rolo de Esperanto en la evoluantaj landoj kaj al ĉi ties rolo en la internacia movado.

Grandioza verko por la praktika esperantisto


Esperanta bildvortaro. Red. Rüdiger Eichholz. Bailieboro, Kanado: Esperanto Press, 1988. 880p. 19cm. ISBN 0-919186-32-7. 90,00 gld.

Pasis ĉirkaŭ 25 jaroj de post la unuaj laboroj pri la traduko de *Duden-Bildwörterbuch der deutschen Sprache* en Esperanton ĝis, en 1988, dum la Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo, Rüdiger Eichholz, la direktoro de la Terminologia Centro de ISAE kaj direktoro de la Sekcio Teknikaj Vortaroj de la Akademio de Esperanto, povis fiere prezenti tiun grandiozan verkon al la parolantaro de la internacia lingvo.

Dank' al s-ro Eichholz, kiun subtenis entute 143 kunlaborantoj el 25 ŝtatoj, tiu ĉi libro, estante licenc-eldono de Bibliographisches Institut AG, Mannheim/FRG, aperis en libroserio de bildvortaroj etnolingvaj. Tio estas avantaĝa, ĉar precize same aranĝitaj nacilingvaj eldonoj de ĉi tiu verko (t.e. por la lingvoj germana, angla, franca, hispana, itala, sveda kaj portugala) ebligas senperan kaj ekzaktan tradukon nacilingven, kondiĉe ke la uzanto posedu ankaŭ tiun etnolingvan Duden-bildvortaron. Sed, memkompreneble, ankaŭ sen ĉi tiu nacilingva paralela eldono, la uzanto de *Esperanta bildvortaro* (EB) profitos senlime kaj abunde el la prezentita vorttrezoro, kiu estas klare aranĝita laŭ temo-kompleksoj. La unuopaj esprimoj estas markitaj per ciferoj, kiuj referencas al same markitaj ilustraĵoj kaj bildoj. Tiel ĉi la uzanto senpene deduktas la nacilingvan ekvivalenton. Aldone preskaŭ ducentpaĝa indekso, fine de EB, retroindikas al la respektivaj ĉapitroj kun klara markado de la trov-loko.

Ĝuste por tiu parolanto de Esperanto, kiu volas vere enprofundiĝi en la maron de miloj kaj miloj da esprimoj, kiuj nacilingve ĉiutage ĉirkaŭas nin – en ĉies laborejo, hejmo, en la kampoj de sporto, distriĝo kaj muziko, scienco, religio aŭ arto k.a. – kaj kiujn ni ofte, sincere dirite, ne kapablas trafe esperantigi pro “ŝajna” manko de trafa Esperanto-termino, ĝuste tiu esperantisto abunde kaj dankeme ĉerpos el tiu ĉi nova trezorejo.

La komencantoj (se temas pri seriozaj kaj lingve vere interesiĝantaj komencantoj) ne bezonas timi tiun dikan, respektodonan libregon. Eichholz eĉ pli ol necese, laŭ mia gusto, proponis helpilojn al la komencanta lingvolernanto, nome li uzis (tra la tuta teksto) disigo-streketojn kaj subliniajn ortanguletojn por apartigi radikojn kaj afiksojn, aŭ por klare montri la termino-elementojn. En la antaŭparolo la aŭtoro aparte menciis tion, dirante: “Mi klopodis tiel atingi, ke la signifoj de la terminoj en EB estu facile ekkoneblaj eĉ por komencantoj,



R. Eichholz kun la frukto de 30-jara laboro.

Perfekta jubilea fabelo

La fratoj Leonkoro. Astrid Lindgren, trad. Kerstin Rohdin. Högsby: la tradukinto, 1987. 128p. 21cm. Ilustris Ilon Wikland. ISBN 91-7810-828-4. Infanlibro de la Jaro 1987. 24,00 gld.

Mi neniam komprenis kial kuniĝas, en la Katalogo de UEA, libroj “por infanoj (kaj komencantoj)”. Ja malmultaj el la enlistigitaj libroj allogus ambaŭ grupojn. En la nova Katalogo 1988/89, tamen, troviĝas unu libro rekomendinda al ne nur infanoj kaj komencantoj, sed al ĉiu, kiu ne tute perdis sian infanfantazion. *La fratoj Leonkoro* estas Esperanta traduko de unu el la plej freŝdataj verkoj de Astrid Lindgren, multpremiita sveda aŭtorino de infanlibroj, kreinto i.a. de tiu nekutima knabino Pippi Longŝtrumpo. En 1987 Esperanto festis sian 100-jariĝon, kaj Astrid Lindgren siajn 80-jariĝon kiel ĉi-mondanino kaj 50-jariĝon kiel verkistino. Ĉi tiu eldonaĵo estas inda honorigo al ĉiuj tri okazaĵoj.

En la 70-aj jaroj usona junulfilmo, *Star Wars* (Stel-militoj), heroldis forlason de la postmilita kulto al la malheroo, kaj reiron al la simplaj valoroj en infankulturo, al la nekomplikaj, nigra-blanke klaraj konfliktoj inter Bono kaj Malbono. Ĝuste tia literaturaĵo estas *La Fratoj Leonkoro*. La konfliktoj okazas en Nangijala, lando ie preter la steloj, lando de revoj realigitaj, kie

“oni travivas aventurojn de mateno ĝis vespero kaj eĉ dum la noktoj.” Sed ne ĉio en Nangijala evoluas senprobleme. Ankaŭ tie embuskas perfido kaj misokazo por malhelpi la finan venkon. La herooj estas dektri-jara Jonatano, bela “kiel fabela princo”, kaj lia naŭ-jara frato Karlo, malforta, denaske malsana etulo, kiun Jonatano ame dorlotnomas “Biskoto”. Kune ili travivas tiajn aventurojn, kiajn la plimulto el ni travivas nur en fantazio.

Verkita laŭ senpretenda, apertanima parolstilo de naŭjara knabeto, la rakonto, “kvazaŭ fabelo, ... kaj ankaŭ iomete kiel fantom-rakonto, kaj tamen ... vera”, estas legebla je diversaj niveloj. Dekkelkjara leganto travivos kun la fratoj aventurojn plej ekscite streĉajn, ĉiam je la flanko de la Bono kontraŭ tiraneco kaj kruelo. La plenkreska leganto faros pli: sur preskaŭ ĉiu paĝo tiu trovos paralelojn kun okazaĵoj, belaj kaj malbelaj, en nia neperfekta mondo. Moralaĵojn oni povas eltiri el religia, politika aŭ ĝenerale homsocia vidpunkto, aŭ oni povas simple lasi sin ensorĉi en la regnon de la genio de fabeloj.

Kerstin Rohdin, tradukinto, kaj Joachim Giessner, lingvo-kontrolinto, zorgis pri belaspekta kaj bonkvalita eldono por sia produkto, kiun ornamas la bildoj de la sveda eldono. Relative malmultas preseraroj – ĉu nuntempe eldoniĝas verko tute sen? – kaj se jen kaj jen la lingvo stumblas, ĝi neniam falas frakasiĝe. Vere, pli belan kontribuon al la centjara jubileo de Esperanto oni malfacile elpensus.

Audrey Childs-Mee (Nederlando)

kaj ke tamen la terminoj estu precizaj por la bezonoj de spertuloj.” Tia faro estas, sub la kondiĉoj de leksikografia laboro, respektinda aŭ almenaŭ tolerebla.

Kio ne estas tolerebla estas la fakto, ke Eichholz, mem membro de la Akademio de Esperanto, memdecide enkondukas – kaj tion li faras ĝuste en tiu ĉi grava kaj multe uzenda vortaro! – novan sufikson *-j/o* por la landnomoj kaj, por mi kurioze, pravigas tiun ĉi sian faron “por forigi la landnoman problemon” en Esperanto (enkonduko, p. 5). Laŭ mi li kreskigas la problemon per plia sufikso, tute superflua. Li ja mem scias, ke ĝuste nuntempe la Akademio de Esperanto estas, sub gvido de d-ro Albault, meze en la diskutado kaj decidado pri la landnoma problemaro.* Tiu novstila sufiksado de la landnomoj ŝokis min, pleje, kiam mi rigardis la liston de la kunlaborintoj (p. 871-872). Mi forte konsilas al s-ro Eichholz uzi en la dua eldono la ĝis nun uzitajn landnomajn formojn. Se li tion ĉi ne bonvolos, mi petas lin streki mian nomon plus la neĝustan landnoman indikon el la listo de la kunlaborintoj.

La *Esperanta bildvortaro*, esence, estas kaj restas grava verko, kiu indas kaj endas estu uzata de ĉiu moderna esperantisto!

D-ro Erich-Dieter Krause (Germana DR)

**Red.: Kvankam intertempe aperis “norma listo de landnomoj”, estas diversaj kialoj konsideri ĝin nur provizora stadio en la debato. Atendeble tio estos temo por diskuto ĉe la UK en Brajtono.*

Tinĉjo, duan fojon nekontentiga

La nigra insulo. La aventuroj de Tinĉjo, vol. 2. Hergé (ps. de Georges Rémi, 1907-1983). El la franca trad. Jopetro Danvy. Parizo: Esperantix, 1987. 62p. Kolorilus. 30cm. ISBN 2-907120-01-8. 16,50 gld.

Aperis la dua volumo de la Tinĉjo-serio: bildstriaĵaj aventuroj de knabo-detektivo, kiu per la helpo de sia hundo Miluo malkovras la sekretojn kaj fiagojn de diversaj krimuloj, majstrante plej danĝerajn kaj atentokaptajn, sed ankaŭ humurajn situaciojn. La aventuroj de la kuraĝa detektiveto estas mondvaste konataj, precipe inter infanoj kaj junuloj. Listo apud la eldonaj indikoj ampleksas tradukojn en 35 lingvoj, alfabeto de la afrikansa ĝis la vaska. Tre aprezinda entrepreno do, eldoni Esperantan version de “Tinĉjo”. Plia avantaĝo estas, ke la kvalito de la kolora preso, bindo, papero ktp egalas al tiu de naciaj eldonoj (nivelo, kiun esperantistaj recenzistoj emas nomi “luksa”).

Fakte oni ja “nur” esperantigas la tekstojn en la “parol-bobeloj”. Tiaj tekstoj havas certajn apartajn ecojn: preskaŭ ekskluzive temas pri dialogoj, do pri ĉiutaga parola lingvaĵo. Ili – jam pro la spacomanko en la parol-bobeloj – estas mallongaj kaj tre koncizaj. Svarmas nekompletaj frazoj, ekkrioj, onomatopeaĵoj. La interligiĝo de la tekstoj ĉefe klariĝas per la bildoj.

Fronte al tiu speciala ĝenro, ĉu la tradukinto majstris sian taskon? La unua volumo (*La krabo kun la oraj pinĉiloj*, 1981) siatempe estis grandega seniluziigo. Ĝi lingve estas tiom, ja ni klare diru ĝin, tiom fuŝa, ke oni ne povas rekomendi enmanigi ĝin al komencantoj. Kaj nun la dua? Pli bona ĝi ja estas, sed bona laŭ mi ne.

Ni citu nur kelkajn pli oftajn strangaĵojn: plurfoja ellaso de *ĉu* ĉe demandoj (ekz. p. 1, 7). Nenecesa kaj tro ofta uzo de la demonstrativo *ĉi tiu*, kie sufiĉus simpla *tiu* aŭ eĉ la artikolo *la* (p. 7, 17, 19 k.a.). Superflua kombino de imperativo kun *vi* (p. 7). Kombino de *iri* kun *por* (p. 5, 7, 14), necerta uzo de la akuzativo (p. 4, “estas kontraŭ vin”, p. 5; “junulo?”, p. 18; “fajron”, p. 19; “kie do mi metis ĝin?”, k.a.). Ofta vortordo laŭ

la modelo “min akuzi” (p. 4), “min konduki” (p. 5; simile p. 7, 15, 17, 18, 19 k.a.), do kiel en la franca. Neklara uzo de la tensoj (ekz. p. 18, “ĉu estus vere?”; p. 21, “Vi estos do ĉiam tiom malatentema”). Krome dubinda vort-elekto (“bank-biletoj” = mon-biletoj, “por vidi” = rigardi), stranga interpunkcio (ekz. p. 18, “La brulŝtipo ... ” k.a.).

Resume: Almenaŭ por mia lingvo-sento ne temas pri “normala”, simpla, flua, ĉiutaga Esperanto, sed mi havas la impreson de traduko, verŝajne el la franca. Kvankam ĝi estas lingve pli bona ol la tute ne rekomendebla unua Tinĉjo-volumo, ĝi neniel atingas la lingvan nivelon ekz. de la Asteriks-eldono. Ankaŭ *La nigra insulo* mi ne uzos kiel legaĵon en kurso por komencantoj. Tro malmodela estas ĝia lingvaĵo.

Kio restas, estas bedaŭro kaj ĉagrenita nekompreneo, ke ŝajne ne eblas kontroligi traduk-malneton per alilingva(j) esperantisto(j).

Bernhard Pabst (FR Germanio)

Melankolia juvelo pri-, ne por-infana

La malgranda Johano. Frederik van Eeden. El la nederlanda tradukis Rejna de Jong. Chapéco: Fonto, 1986. 142p. 21cm. Fonto-Serio n-ro 13. 13,50 gld.

Ĉi tiu eta sed enhave koncentrita, pensiga romano aperis unue en nederlanda gazeto ekde 1885, mallongigite en la angla jam en 1911. Bulthuis aperigis Esperantan version en 1926; mi informiĝis, ke la traduko de 1986 estas multe pli bona. Ne scipovante la nederlandan, mi mem ne kompetentas taksu ĝin kiel tradukon; sed Rejna de Jong donis al ni stile belegan, kristale klaran juvelon de Esperanta prozo, rekomendindan kiel valora artverko sed ankaŭ kiel stila modelo por progresantoj. Ŝi afable glosas vortojn ne en *PV-kun-Suplemento*; sed el 39 tiaj vortoj nur 3 ne troviĝas jam en *PIV* – kaj estas ĉarme, ke botaŭro, kun sia unika bleko, “oŭmas”.

Brile portretinte kiel infano spertas sian mondon, observeme, animisme, propralogike miskomprenante, Van Eeden kondukas Johanon unue al aventuroj en harmonio kun la naturo, kiam kun papilieca amiketo, Nimfeido, li esploras ĉarman fantazian mondon de konversaciantaj ranoj, kunikloj, lampiroj kaj aliaj, ĉiuj kun subjektivaj vidpunktoj ne flataj al homoj. Poste, koboldo, Kialtio, igas lin alimaniere sciavida; sed apetito al klarigoj kaj kompreno kreas ian nekontentigeblecon, kiu detruas pli fruajn ĝojojn. Rifuĝinte, penta, en fremdan hejmon, li renkontas Robineta’n, delikatan unuan amon, sed perdas ŝin, ĉar liaj herezaj honestaĵoj ofendas ŝian patron. Poste venas Dis Esploro, aroganta, cinikiga; la Morto, fakte pli amikeca; kaj sciencisto, kiu igas lin komplico en vivisekcio. Ili montras al li malbelajn aŭ falsajn aspektojn de homoj kaj socio; koŝmara subtera ekskurso montras putrantajn kadavrojn, eĉ lian propran estontan; li revidas, sopirinte, sian patron, sed nur mortantan. Finfine li renkontas Iun, kiu invitas lin reiri al “la homaro kaj ĝia doloro” – kaj tie la aŭtoro forlasas lin en situacio nefina, ambigua.

La romano enhavas ecojn de fabelo, kaj la unuaj fantazioj eble sorĉus infanon. Ĝi tamen ne estas porinfana: estus ja bedaŭrinde, instrui etulon timi sciamon, malami sciencon, trokonscii pri morto. Jen sombra verko de malkvieta geniulo: riĉe aludoplana, oblikva, implicema; kelkloke satira, aliloke dolĉe humura, foje angora – sed ĉiam leginda. Rejna de Jong redonis al esperantistaj literaturamantoj maturaj fabelon melankolian, stile brilan.

Marjorie Boulton (Britio)

Acta interlinguistica. 13-a Scienca Interlingvistika Simpozio, 1985. Red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1989. 172p. 20cm. Dek kvar prelegoj tre diversspecaj: i.a. komparaj studoj inter Esperanto kaj aliaj lingvoj, priskriboj de la interna funkciado de Esperanto kaj ĝeneralaj konsideroj pri la interlingvistiko. 18,00 gld.

Antologio de la moderna bosnia-hercegovina novelo. Kompilis kaj enkondukis Ĝemaludin Alić. El la serbokroata trad. diversaj. Sarajevo: ELBIH, 1989. 178p. 22cm. Dudek kvin rakontoj el la 20-a jarcento, kiuj jen tuŝas la historion de tiu multetna parto de Jugoslavio, jen alvokas al universalaj homaj valoroj, jen bildigas fremdigitan kaj komplikan mondon. 37,20 gld.

Aventuro de ĉasisteto dum ekspediciado. Ĉen Ŝjaŭji. Ilustris Hu Hŭanĵan. El la ĉina trad. Hŭang Fengĝu. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 81p. ISBN 7-5052-0032-1. 18cm. Aventuroj en la sudamerika ĝangalo, kun zorgaj priskriboj de la bestoj kaj ilia medio. 5,10 gld.

Elektitaj versoj el la Sankta Korano. El la araba tradukis Italo Chiussi; la prezenton tradukis el la nederlanda A.J.Middelkoop. Den Haag: Ahmadiyya-Movado en la Islamo, 1988. 124p. ISBN 90-71624-02-1. Dulingva eldono de kelkaj fundamentaj dogmoj de la islamismo. 12,00 gld.

Ergotado, versumado! Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Ligo, 1989 (jaro neindikita). 72p. 17cm. Diversĝenraj pensoj. 4,50 gld.

Ergoto de Ergoto, La. Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Ligo, 1989 (jaro neindikita). 72p. 17cm. Rimaĵoj k.a. pri la Esperanta vivo. 4,50 gld.

Esperanto el la vidpunkto de verkisto. Claude Piron (1931). Vieno: Pro Esperanto, 1989. 16p. 21cm. Skizo pri kelkaj karakterizaj avantaĝoj de Esperanto el lingvokrea vidpunkto. 5,70 gld.

Esperanto; Fickordlista svenska-Esperanto. Red. Malte Markheden. Motala: Progreso, 1989. 25p. ISBN 91-87320-05-3. 14cm. Unudirekta vortpararo. 3,30 gld.

Hafez in 30 Languages. Šams od-Din Mohammad Hafez (ĉ. 1320-1389). El la persa en Esperanton kaj en la anglan tradukis William Auld, en 27 aliajn lingvojn tradukis diversaj. Teherano: Padide, 1989. 36+818p. 25cm. Bind. Plenkolorj ornamaĵoj kaj ilustraĵoj sur 768 paĝoj. Elektitaj "gazaloj" el la verkaro de persa poeto fama pro sia zorge polurita lirikismo kaj subtila filozofio. 126,00 gld.

Instrukciaro, por kursgvidantoj uzantaj la Zagreban Metodon. Zlatko Tišljarić (1945). Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1989. 55p. 20cm. 9,90 gld.

Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages. Div. aŭtoroj, red. Klaus Schubert (1954). Berlin/New York: Mouton de Gruyter, 1989. 348p. 23cm. Bind. Trends in Linguistics: Studies and Monographs 42. ISBN 0-89925-548-5. Studoj prezentantaj ĝisdatan superrigardon de la interlingvistiko, i.a. pri la difino de la fako, lingvoplanado, terminologio, kaj la sociologiaj, literaturaj kaj gramatikaj ecoj de Esperanto. Nur anglalingva. 105,00 gld.

Karakole, karambole! Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1989 (jaro neindikita). 72p. 17cm. Ĥaosa kompilaĵo de E-temaj humuraĵoj, eseetoj k.s. 4,50 gld.

Komedioj. Jules Courteline (1858-1929). El la franca trad. Hervé Gonin k.a. Paris: Franca esperantisto, n-ro 400, 1989. 68p. ISSN 0775-7698. Antologieto de la franca literaturo. 21cm.

Rolas karakteroj "samtempe burleskaj kaj veraj, preskaŭ proverbiaj" en la unuaktaĵoj "La timo je batoj", "Sinjoro Badin", "Teodoro serĉas alumetojn", "Gravaj ĉagrenoj", "La kod-artikolo 330", "La paco hejme". 8,10 gld.

Nesto de birdoj. Literatura antologio, Kunmetis Nikola Pilev, Penju Stojanov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1987. 231p. 22cm. Fotoj. Prezento de la urbo Haskovo kaj ĝia distrikto per tradukoj de lokaj verkistoj, originalaj poemoj kaj rakontoj de membroj de la loka movado, kaj notoj pri la historio de Esperanto en tiu regiono. 15,30 gld.

Oktavia. (Atribuita al) Seneca (4 a.K.-65 p.K.). El la latina trad. Gerrit Berveling (1944). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 59p. ISBN 90-71205-27-4. 21cm. Serio "Stafeto", n-ro 9. La sola restanta historia dramo el la klasika latina periodo: tragedio pri la edzino de la romia imperiestro Nerono, kiun li mortigis en la jaro 62 p.K. 9,90 gld.

Ruza Petro. Humura legolibro. Sava Popov. El la bulgara trad. Kolio Panĉev. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1986. 116p. 20cm. Ilus. Fabeloj pri bulgara folkloro heroo, fama pro siaj ŝercoj kaj ruzaĵoj. 12,60 gld.

Sankta lingvo kaj la Internacia, La. Jeremi Gishron (1948). Jerusalemo: Sivron, 1989. 15p. 15cm. Mimeo. Pri la "rilato inter lingvo kaj mesaĝo" ĉe la hebrea kaj Esperanto. 5,40 gld.

Tra(nskon)dukoj/Übertragungen. Div. aŭtoroj. El la germana trad. Guido Holz (1920-1989). Messkirch: Armin Gmeiner, 1989. 123p. ISBN 3-926633-14. 15x22cm. Ilustrita. Okdek germanaj poemoj de la 12-a ĝis la 20-a jarcento, prezentitaj dulingve en bela eldono. 21,00 gld.

Ture Sventon en Londono. Åke Holmberg (1907-). El la sveda trad. Malte Markheden. Motala: Progreso, 1989. 64p. ISBN 91-87320-04-5. 21cm. Amuza kaj streĉa detektivrakonto: kiel mistera fremdulo sukcesas enŝteliĝadi en la trankvilan domon de Lordo Hubardo? 18,60 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Ĉu mankas al vi materialoj por publika prezento?

Nun haveblas la

INTERNACIA EKSPOZICIO DE UEA

Ĉi-momente la Ekspozicio uzeblas en du formoj:

- 35 koloraj paneloj, 60 x 85 cm;
- kompleto de 36 lumbildoj (prezo: 84 gld.)

Pruntante la panelojn aŭ aĉetante la lumbildojn, vi ricevas krome detalan gvidlibron.

Turnu vin al la Direktoro de la Centra Oficejo por pliaj informoj.

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn – sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Gustigo geografia

Bonvolu korekti la anoncon aperintan en *Esperanto*, aprilo 1989, je la paĝo 78-a (“Loke”, Alpoj-Adrio). Fakte la Trilanda Konferenco, kiu ĉi-jare festos sian 20-an datrevenon, okazas inter la jenaj ŝtatoj: Aŭstrio–Italio–Jugoslavio. Nuntempe en la regiono forte aktivas, en ĉiuspecaj kampoj, la tiel-nomata Alp-Adrio Laborkomunitato [tiele], kiu konsistas el kelkaj ĉelimaj regionoj de Italio, Aŭstrio, Jugoslavio, Hungario kaj FRG.

Sekve la organizantoj de la nuna Trilanda celas aligi al ĝi ankaŭ la Esperanto-grupojn el tiuj regionoj de Hungario kaj Germanio, kiuj aktivas en Alp-Adrio.

Elda Doerfler (Italio)

Hiperkosta HyperCard

En la maja numero de *Esperanto*, mi legis mencion de mia HyperCard-a kurso pri Esperanto. Mi volas korekti kaj klarigi du aferojn.

Vi diris ke ĝi “instruas ... pere de bildoj kaj sinteza voĉo”. Sed oni komprenu ke la kurso konsistas plejparte el teksto en la angla lingvo; la bildoj kaj sinteza voĉo estas nur (espereble interesaj kaj eĉ unikaj) aldonoj al la teksto.

Mi permesas al ĉiuj libere fari kopiojn de la kurso. Educorp Computer Services ŝajne trovis kopion kaj vendas tiun version kontraŭ \$7 usonaj. Estas tute laŭleĝe, sed mi aŭdas ke tiu versio estas tre malnova kaj havas kelkajn erarojn, iujn gravajn. Pli novan version oni povas mendi de ELNA; ĝi kostas nur \$3.35.

Michael Urban (Usono)

Por kvalito, ne kvanto...

La artikolo de B. Wennergren en n-ro 2/1989 de nia organo estas aktuala kaj bonintenca. Estas vero, ke la plimulta esperantistaro ne regas Esperanton. La nesufiĉa lingva nivelo estas ofte primokata kaj estigas malestimon al nia movado ĉe ne-esperantistaj medioj. H. Tonkin kuraĝis diri en Svedio dum la Jubilea Jaro, ke “Esperanto pereos pro nescio”

(Kongresa Libro, 1987). Miaopinie tio ne okazos, ĉar en la movado estas aŭtoritataj kaj inteligentaj homoj, kiuj aktivas por Esperanto.

Strategio de UEA sen varbado ne eblas. Sed ni varbu talentajn homojn kiuj serioze lernos la lingvon, uzos ĝin kaj helpas al ties prosperigo.

La reteno de la esperantistoj estas ĉiama pridiskutinda temo.... Bedaŭrinde bonaj Esperanto-uzantoj, forlasintaj la E-organizon lokan pro agadstilo de estraro trudita desupre, troviĝas ekster la movado. Ni flegu rilatojn kun ili. Ilia eldiro por Esperanto certe valoras pli ol “la vigla agado” de krokodilantoj.

Olga Cankova (Bulgario)

...aŭ inverse?

En la aprila *Esperanto* mi legis kun granda intereso la artikolon “Trarigardo de la Esperanta gazetaro”. En multe da eltiraĵoj la skribintoj maltrankviliĝis pri la Esperanta estonteco pro la nombro de la esperantistoj. Fakte, en multe da landoj la esperantistaro ne plu kreskas kaj kelkfoje malgrandiĝas.

Jen mia opinio, kiu eble ne multe valoras ĉar mi estas esperantisto nur ekde kelkaj jaroj, malgraŭ mia emerita aĝo.

Ŝajnas al mi ke la esperantistoj parolas, skribas, kunvenas, kongresas, “rondiras”, sed ne sufiĉe propagandas, varbas novajn samideanojn. La unua devo por esperantisto devus esti *alkonduki al Esperanto, ĉiujare, novan adepton*. Por tio, oni devus antaŭ ĉio koncentri sian strebadon por propagandi kaj trejni esperantistojn por tia agado.

Ni certe bezonas Esperantan klerularon, sed ni ege bezonas ankaŭ propagandantojn, instruantojn, lernantojn.

Marc Jeannier (Francio)

Kaj kie la dekdua?

Laŭ la lernita de mi matematiko, dek unu ne egalas al dek du, same kiel unu ne egalas al du. Tio estas laŭ miaj instruistoj kaj laŭ mi. Sed, ŝajne, ie okazas miskompreno: la revuo *Esperanto* aperas “monate (escepte de aŭgusto)”. Tio signifas ke ĝi aperas 11 fojojn jare. Tamen, la decembra numero estas la 12-a. Kaj tio okazas ĉiujare. Kiu estas la 11-a numero de *Esperanto*? Ne diru al mi ke la julia-aŭgusta numero estas duobla. Mi ja sciopovas kalkuli sufiĉe bone, kaj mi eĉ

posedas komputilon, sed mi neniam trovis en la menciita numero pli ol 20 paĝojn. Ĝi ne estas, do, duobla, laŭkvante. Kial, tiam, ĝi portas duoblan (7-8) numeron? Kiel iu samideano diris al mi, tio similas al daŭra trompado. Nu, tutcerte, ne tion deziras UEA. Kaj tamen tio okazas.

Mi demandas nun: Ĉu ne eblus aliel? Ĉu ne eblus havi dek du (12) verajn numerojn de *Esperanto* jare?

Se mi estus estrarano de UEA, mi proponus al miaj samaranoj, eldoni ĉiujare ankaŭ aŭgustan numeron de la diskutata revuo. Kaj mi proponus, ke tiu numero enhavu precipe literaturajn-artajn-kulturajn artikolojn. Mi proponus numeron, kiu povus esti kompilita antaŭe, kaj kiu ne nepre enhavu freŝajn informojn movadajn. Tia numero anstataŭus la iaman valoran revuon *Belarto*....

Mi ŝatus scii kion opinias pri tio la estraranoj de UEA. Eble, diskutinda afero dum la alproksimiĝanta UK, al kiu mi deziras grandan sukceson.

Ionel Onet (Usono)

Mankas kunordigado

CIREEL (Centro por informado kaj esplorado pri la instruado kaj apliko de lingvoj), kun la patroneco de Eŭropa Konsilio, organizas manifestaciojn en la landoj de EK cele al malplialtigo de la lingvaj baroj por la eŭropaj civitanoj.

Kiel konate, al tiu celo respondas la esperantista movado. Sed pri la lasta aranĝo de CIREEL, en Milano, la esperantistaj instancoj ricevis nek informon nek inviton. Ili nur hazarde pere de la loka gazetaro akiris la sciigon, kaj devis en mallonga tempo decidi kaj organizi sian ĉeeston.

Ĉar UEA estas en konsultaj rilatoj kun la Eŭropa Konsilio kaj okupas sin pri la internacia lingvo-problemo, estus logike atendi ke UEA mem havigu al si ĝustatempe informojn, klopodu havigi inviton al E-instancoj aŭ konataj spertuloj, kaj atentigu la landajn asociojn por ke ili povu sin prepari en taŭga maniero.

Pluraj estas la okazoj por montri la solvon per Esperanto de kelkaj lingvaj problemoj. Sed la okazoj restas neutiligitaj sen ĝustatempe informo aŭ samcela agado en la diversaj landoj. Ĉu ni povas esperi ke en la baldaŭa estonto la kunordiga agado de UEA helpas por atingi efektivajn rezultojn?

Umberto Stoppoloni (Italio)

• **Argentino:** Meze de la urbo Mar del Plata estas starigita Zamenhof-busto, laŭ iniciato de la loka Esperanto-asocio kaj kun la subteno de 135 lokaj eminentuloj. La inaŭgura ceremonio okazis la 10-an de decembro 1988.

• **Brazilo:** Belorizonta E-Asocio lanĉis informkampanjon, por kiu ĝi presigis 15 mil profesia-aspektajn flugfoliojn kun la devizo "Havu milionon da amikoj en la tuta mondo". Ekde aprilo la asocio aperigas sian bultenon *La obelisko* ĉiumonate: skribu al CP1697, BR-30161 Belo Horizonte (MG), Brazilo.

• **Bulgario:** En la lasta semajno de majo okazis en la bulgara ĉefurbo Sofio monda filatela ekspozicio, kiun partoprenis Bulgara Esperantista Asocio. Dum dek tagoj ĝia stando informis pri la Esperanta filatela movado kaj disvendis librojn, periodaĵojn, diskojn, insignojn kaj jubileajn poŝtmarkojn.

Sammonate fondiĝis sekcio de bulgaraj parlamentanoj-esperantistoj, komence kun dek membroj. Ĝia prezidanto estas vicprezidanto de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto, Sava Dalbokov, samtempe la prezidanto de BEA.

• **Francio:** En la Tuluza Karnavalo en aprilo partoprenis komuna E-ĉaro de la tri tuluza E-societoj – la neŭtrala, la laborista kaj Eŭroka. Tiu lasta prizorgis muzikistojn en Esperanto, kiuj altiris multan atenton. Ĉar la urbestro minacas malpermesi la venontjaran festivalon, oni petas vin skribi poŝtkarte al la tuluza urbestro petante ĝian daŭrigon.

• **Hungario:** El lastatempa numero de la novaĵplena movada revuo *Budapeŝta informilo* eblis ekscii, ke Hungara E-Asocio aktuale havas 7 plentempajn kaj 2 parttempajn dungitojn por sia ĝenerala administrado, 7 dungitojn en sia presejo, 2 por eldona administrado (plus parttempa gvidanto), duontempan libroserviston, 2 plentempajn kaj 4 parttempajn redaktorojn por kvar revuoj, kaj 14 dungitojn kadre de Reklama kaj Propaganda Sekcio. Oni mencias ankaŭ la eksperimentan dungon de plentempa lerneja instruisto, novan kunordigiston de la instruado, kaj memstaran ekonomikan grupon kun tri dungitoj. Jen guto ne tiom malgranda....

• **Irlando:** Eble unuafoje aŭdiĝis Esperanto en mez-irlanda preĝeja ceremonio.

Laŭ propono de neesperantista metodista pastro en Tullamore, plurlingva interkonfesia diservo dediĉita al la Tria Mondo enprenis ankaŭ la internacian lingvon.

• **Italio:** Debato pri la temo "Kiu lingvo por Eŭropo" okazis la 3-an de majo en la 900-jara Universitato de Bolonjo. D-ro Albert Menabene defendis la pretendojn de Esperanto kontraŭ docentojn subtenantajn la anglan kaj la francan. Pli ol 120 homoj ĉeestis, kaj pluraj poste anoncis sin por lernado de Esperanto – inkluzive de unu el la docentoj.

• **Jugoslavio:** Jam 30 jarojn aperas regula E-rubriko en la gazeto de la Zagreba Elektra Tramo (ZET), kiel parto de la paĝo "Tra la mondo". La rubrikon fondis, samtempe kun la gazeto mem, tiama ĉefredaktoro Zvonko Rehoric. La nuna redakcio havas kunlaborantojn pri la temo "transporto" en dudeko da eŭropaj landoj.



• **Tanzanio:** Okaze de vizito de Feliks Malinowski (Pollando), la anoj de Bunda Esperanto-Klubo aranĝis safaron (veturon por spekti aŭ ĉasi sovaĝbestojn) en la fama nacia parko Serengeti, nur 12 kilometrojn for de la vilaĝo. La kluba prezidanto Mramba Simba krome akompanis s-ron Malinowski dum informvizitoj al diversaj lokaj instancoj.

• **Kanado:** Okaze de la unua Ontaria Esperanto-Kongreso, en la kanada ĉefurbo Otavo, naskiĝis Ontaria Esperanto-Asocio (OEA). Ĉeestis 17 homoj, el kiuj Manuel Kampanjaña fariĝis la unua OEA-prezidanto kaj Greg Meadows la sekretario-kasisto. La nova organizaĵo celas organizi kursojn kaj kunvenojn tra la plej loĝata kanada provinco, laŭeble kun subteno de la provinca registaro.

• **Koreio:** Pan-Monda Turismo (aŭ, pli Esperante, Tutmonda Turismo), agentejo en Seulo, eldonis en Esperanto lukse presitan prospekton pri siaj ekskursoj kaj aranĝoj en Suda Koreio. Petu senpagan ekzempleron de RM 301 Dankook B/D, 97, Nonhyŝn-dong, Kangnam-ku, Seoul 135010.

• **Kubo:** Fondiĝis Havana Esperanto-Klubo por Informado kun Julio Martínez Fiallo kiel prezidanto kaj Rita María

Suárez kiel vicprezidanto. La klubo bonvenigas korespondadon pri la informado pri Esperanto pere de Kuba Esperanto-Asocio, Apartado postal 2018, La Habana 2.

KEA cetere festis sian dekjarigon la 17-an kaj 18-an de junio kadre de la 1-a E-festivalo en Kubo.

• **Mediterraneo:** Novan transliman regionan organizaĵon lanĉis Paŭlo Touron (3 rue de Combret, F-30000 Nîmes). Temas pri Nordokcidenta Mediteranea Amikaro, kiu celas kunlaborigi esperantistojn el orienta Hispanio (inkl. Katalunion), suda Francio kaj nordokcidenta Italio.

• **Svedio:** La unuan fojon post la dua mondmilito, la svedan kongreson (Norrköping, 21-23 aprilo) ĉeestis esperantistoj el Latvio kaj Estonio. Inter aliaj eksterlandaj gastoj estis la polaj aktorino Jadwiga Gibczynska kaj radioredaktoro

Andrzej Pettyn. La kongreso decidis, i.a., ke la sveda movado aparte provos varbi membrojn inter la multaj enmigrintoj en la lando, kaj notis kreskantan intereson pri Esperanto ĉe la sveda radio.

• **Turkio:** La vojaĝoficejo Bodrumtur en Istanbul decidis komence de 1989 fondi fakon pri Esperanta turismo. Konstatante, ke ne troviĝas sufiĉe da E-parolantoj en la regiono, la agentejo turnis sin al la studentoj ĉe Bosfora Universitato. Ekde la 25-a de majo funkcias du kursoj por 54 el ili sub la gvido de Enver Yalĉin, tri horojn semajne. Korespondemuloj skribu al PK 1328, Sirkeci, Istanbul, Turkio.

• **Vjetnamio:** Hanoja E-Klubo kunlaboras kun Hanoja Turisma Unio por akcepti eksterlandajn esperantistojn kaj montri al ili la urbon kaj regionon. Turnu vin al Hanoja E-Klubo, 46 Tr n Hung Dao str., Hanojo (tel. 53841).

• **Ekologio:** La Ekokomisiono de Sovet-respublikara Esperantista Unio kaj la Ekosekcio de Bulgara Esperantista Asocio interkonsentis pri kunlaboro, cele al uzado de Esperanto por mediprotektado. Inter konkretaj paŝoj estas eldonado de ekologia literaturo kaj partopreno en movado por "savo de la Nigra Maro".

• **Ekonomio:** La unua Nobel-premiito pri ekonomiko, nederlanda profesoro Jan Tinbergen, akceptis aŭspicii *Ekonomia bulteno pri Usono* per honora abono. En sia konfirma letero li skribis (anglalingve) al la redaktoro, d-ro T. Goldman: "Mi plene subtenas ĉiun provon enkonduki Esperanton kiel studtemon en la elementa, meza aŭ aliaj edukaj institucioj." Por aliĝi al la centoj da abonantoj de la Bulteno, sendu US\$12 al Interfakto, PO Box 42205, Washington, D.C. 20015, Usono.

• **Filatelo:** En la revuo de la Brazilia Poŝta kaj Telegrafia Kompanio, *Correio Filatélico* (jan.-feb. 1989), aperis unupaĝa artikolo de d-ro R. Resende pri la ligoj inter Esperanto kaj la filatelo. La redakcio prezentis la artikolon kiel omaĝon al la 130-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

• **Fotoarto:** Junulara Sekcio de Ĉeĥa E-Asocio anoncas internacian foto-konkurson "Juneco '89". Iu ajn rajtas partopreni, sendante maksimume kvar nigrablankajn kaj kvar kolorajn fotojn en formato 30x40cm pri la vivo de gejunuloj el la tuta mondo. Dorse estu indikitaj la nomo, adreso kaj naskiĝdato de la aŭtoro, kun titolo de la foto en la ĉeĥa aŭ Esperanto. Eksterlandaj konkursantoj kunsendu 4 irk aŭ petu nuligon de la partoprenkotizo. Limdato por ricevo: 15-an de septembro 1989, ĉe Petr Šmíd, Kostelecká 1829, CS-54701 Náchod, Ĉeĥoslovakio. Ĉiuj fotoj estos poste redonitaj.

• **Infanrakonto:** Ĝis la 30-a de septembro oni sendu siajn originalajn aŭ tradukitajn infanrakontojn, verkitajn en facila lingvaĵo por geknaboj inter 7- kaj 10-jaraj, al Inés Gaston, Fundación Esperanto, P. de la Constitución 35/4, E-50001 Zarazoga, Hispanio. Unua premio: 10 000 pesetoj, dua premio: 5 000 pesetoj, ambaŭ kun konfirma diplomo. Longo: 2-3 paĝoj, tajpitaj kun duobla interspaco en kvin ekzempleroj kaj signitaj per pseŭdonimo. En aparta fermita koverto estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto. La rakontoj povas esti ilustritaj, sed pro ebla

eldono la bildoj devas esti originalaj. Oni anoncos la rezulton la 15-an de decembro 1989.

• **Interlingvistiko:** Laŭ rekomendo de la 22-a Konsultiĝo de la E-Asocioj de Socialismaj Landoj (vd. la majan numeron, p.81), iniciata grupo entreprenis starigi Internacian Kunordigan Komitaton de Interlingvistoj (IKKI). Ties unua prezidanto estas sovetia lingvisto S. Kuznetsov, kiu esploras la fondon de sekretario en Moskvo. La unua ĝenerala kunveno de IKKI okazos en Bad Saarow (GDR), aŭtune de 1990. Ĉiuj interesatoj, ne nur el socialismaj landoj, sin direktu al d-ro sc. Sergej Kuznetsov, Instituto pri Lingvistiko, Sovetia Akademio de Sciencoj, Semaŝko 1/12, SU-103009 Moskvo.

• **Landonomoj:** La "norma listo de landonomoj" de la Akademio de Esperanto, aperinta antaŭ du monatoj, elvokas diversspecajn reagojn. La magazino *Monato* tuj anoncis sian intencon apliki ĝin al la tekstoj de siaj aŭtoroj, tiel ke "Togolando" kaj "Zairio" subite fariĝis "Togolo" kaj "Zairo". Tiu ĉi revuo ne tiom hastos. Ni atendas viglan, por ne diri akran diskuton dum la Brajtona UK, kie interalie la Landaj Asocioj en Koreio ("Koreo") kaj Novzelando ("Zelando") aŭdigos siajn protestojn. Estas interesa demando, ĉu la tasko de la Akademio "kontroli" la lingvo-uzon etendiĝas al la rajto rekomendi tute ne uzatajn formojn.

Ke ĉiu "norma listo" estas nur provizoraĵo sugestas artikolo en la internacia anglalingva magazino *Time* (12 junio). Tie oni atentigas, ke Birmo nun oficiale nomiĝas la Unio de Mjanmo, kaj skizas la evoluon de la ŝtata nomo por Kamboĝo/Kambodio/Kampuĉeo. (Princo Sihanouk, oni raportas, evitas preni starpunkton pri la demando.) Manke de internacia leĝo pri landonomoj, la ĵurnalistoj sugestas, oni principe sekvu la dezirojn de la koncerna registaro.

• **Medicino:** Post anonco en la februara "Loke"-rubriko, d-ro P. Schepers, ĝenerala sekretario de Monda Federacio de Kuracistoj kiuj Respektas la Homan Vivon, ricevis plurajn informpetojn el diversaj landoj. Se montriĝos sufiĉe da intereso, li pretas uzi ankaŭ Esperanton kadre de la trimonata bulteno de MFKRHV, kiu aperas angle, france kaj hispane. Ĉu troviĝas volontula redaktoro por tia rubriko? Skribu al d-ro Schepers ĉe Serruyslaan 76, B-8400 Oostende, Belgio: li legas Esperanton sed provizore respondos angle, france aŭ nederlande laŭ via elekto.

• **Muziko:** Vere okazas io fenomena en la Esperanta muzika mondo. En majo ni raportis pri la aperonta disko de Team'; nun antaŭ kelkaj tagoj venis anonco el Sovetunio pri disko de Vladimir Soroka, kantisto kaj komponisto ege populara en la sovetia movado, kaj ekzemplero mem de altkvalita kasedo kun Esperantaj adaptoj de furoraj brazilaj kantoj, *Aaron brazilumas Esperante*. Tenu la okulon ĉe "Laste aperis" por gvati ilian enmerkatiĝon!

• **Religio:** La brazila ekumena organizaĵo Legio de Bona Volo lastatempe vaste dissendis invitojn al la inaŭguro de la Templo de Bona Volo, kiu okazos en la ĉefurbo Braziljo la 21-an de oktobro. Temas pri unu el la unuaj internaciaj asocioj, kiuj provas varbi subtenon pere de "rektapoŝta" tekniko inter la Esperanta publiko – do al individuoj kaj ne nur asocioj. Organizologoj atentu la venontjarajn statistikojn de LBV....

Kanada organizaĵo lanĉis projekton de "Mondaj Interkredaj Kolegioj", internaciaj lernejoj por 16- ĝis 19-jaruloj, kiuj instruos komprenemon por aliaj religioj kaj la spiritan bazon por neperforta solvo de mondaj problemoj. Interesatoj skribu, prefere anglalingve, al World Interfaith Colleges, PO Box 7384, Station D, Victoria, B.C., Kanado V9B 5B7.

La Gazeto

sendependa
mondkultura
esperantisma
revuo

provekzemplero kaj abono:
39, rue Joseph Hénot
F-57070 - Metz -Francio

• **Scienco kaj tekniko:** Ekde februaro 1989 Scienc-Teknika E-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj eldonas, krom la jam konata *Tutmondaj sciencoj kaj tekniko*, pli modestan kaj oftan *Informilo*, kun la celo "rapidigi la interŝanĝon kaj komunikadon de scienc-tekniko kaj ekonomikomerco". Ni esperas, ke STEA povos daŭrigi sian internacian agadon malgraŭ la malliberaliĝo de la enlanda politiko. En ĝia programo estas i.a. dua internacia akupunktura kurso kaj decembra ekonomia konferenco en Shenzhen. Turnu vin al STEA, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864 Beijing.

Nekrologoj

MIKLOS BERÉNYI (1912-1989) forpasis en majo en Budapeŝto, Hungario. Dum 20 jaroj li estis la ĉefdelegito de UEA en Hungario, kaj krome fakdelegito pri sporto.

ATANAS BOJAĜIEV (1906-1989), fakdelegito pri ĵurnalismo dum pli ol tridek jaroj, forpasis la 10-an de marto 1989 en Ŝumen, Bulgario.

HUGO ANTONIO LINGUA (1928-1989), fakdelegito pri E-instruado kaj dum kelkaj jaroj UEA-peranto por Argentino, mortis la 1-an de aprilo en Rosario. Inter 1963 kaj 1973 li redaktis entute 132 numerojn de *Lerneja Esperanto-revuo*.

ELIO MIGLIORINI (1902-1988), unu el la "kaŝitaj kolonoj" de la itala movado, forpasis en julio de la pasinta jaro. Li estis eminenta geografo, i.a. membro de la itala scienca akademio kaj profesoro en la roma universitato. Kun sia frato-lingvisto Bruno li aŭtoris E-legolibron kiu trairis ses eldonojn ekde 1925; li krome tradukis kaj verkis pri la historio de la itala movado. Dum pli ol sesdek jaroj Elio Migliorini estis delegito aŭ fakdelegito en Romo kaj Napolo.

PANDIŜO (1910-1989), E-instruisto kaj tradukanto, kunlaboranto de *El popola Ĉinio*, forpasis la 18-an de majo 1989 en Ŝanhajo. Li eklernis Esperanton 16-jara kaj konstante aktivis por ĝi poste, unue kadre de sia laboro kiel fremdlingva instruisto kaj pere de korespondado kun kelkcento da esperantistoj en kvardek landoj. De 1949 li okupiĝis pri verkado kaj tradukado (li kunredaktis i.a. *Ĉina antologio 1949-59*), kaj post la Kultura Revolucio reenkondukis Esperanton en la fremdlingvan fakultaton de Orient-Ĉina Normala Universitato. Dum la lastaj jaroj li okupiĝis pri vortarkompilado.

GAUDENZIO PISONI (1920-1988), dum dudek kvin jaroj delegito kaj fakdelegito pri instruado en Novara, Italio, mortis tie pasintjare. Liaj tradukoj el la itala aperas i.a. en *Itala antologio* kaj *Elektitaj sonetoj de G. Belli*; li estis plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA kaj en aliaj literaturaj konkursoj.

JOHN REYNOLDS SALTER, dumviva membro de UEA, forpasis la 10-an de majo 1989 en Exeter, Britio.

JOZEF TOCZYSKI (1906-1989), honora membro de UEA, mortis la 1-an de majo 1989 en Gdansko. Esperantisto ekde 1919, ĝis la dua mondmilito li aktivis i.a. kiel gvidanto de la skolta E-movado en Pollando. Jam tiam li estis delegito de UEA kaj prezidanto de loka filio de Pola E-Asocio. Post la dua mondmilito li kungvidis la reaktiviĝon de PEA, dum pluraj mandatoj kiel vicprezidanto. De 1960 ĝis 1967 li redaktis la E-elsendojn de la Pola Radio en Gdansko. Profesie instruisto, li reprezentis ILEI en Pollando dum tri jardekoj kaj organizis multajn junularajn renkontiĝojn kaj kursojn. Li restis fakdelegito de UEA, fariĝis ties komitatano en 1964, kaj estis ĝia estrarano pri lerneja agado en la periodo 1964-69. Poste li plenumis la oficon de pola ĉefdelegito dum 17 jaroj. La valoron de tiu tuta dumviva agado indikas la fakto, ke PEA, ILEI kaj UEA aparte sed unuanime distingis Józef Toczyski per honora membreco.

KONSTANTINOS ZAHARIADIS (1907-1989) mortis la 17-an de majo 1989 en Tesaloniko, Grekio. Li estis fakdelegito pri fervojoj dum dudek jaroj kaj urba delegito de 1969 ĝis 1984.

Kalendaro

Pliaj detaloj pri la ĉi-subaj aranĝoj estas ofte, sed ne ĉiam, haveblaj ankau de la Centra Oficejo (tel. +31 10 436 10 44 / Mark Fettes)

daŭre **BET "Esperantotur"**, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando
Kultura Centro Esperantista (KCE), Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario
Esperanto-sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo "Express", Pk. 567, H-1395 Budapest, Hungario

aŭgusto (kompletigo de la marta listo)

12-18: **Internacia Somerlernejo**, Barlaston, Anglio (Wedgewood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs St12 9DG)
 13-18: **2-a Internacia Esperanto-Konferenco kaj 8-a Internacia Literatura Forumo**, KCE, Svislando (adreso supre; temo "La fenomeno Edmond Privat")
 19-20: **Festo Edmond Privat**, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

septembro

02-15: **25-a Jubilea Esperantista Feriado** (parto 2 – "Adiaŭ somero", por studentoj-junularo), Międzygórze, Pollando (Pola Esperanto-Asocio, Pk. 16, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wrocław 17)
 03-09: **2-a Studenta Aranĝo Septembra**, Mylof (apud Bydgoszcz), Pollando (Jarosław Miklasz, ul. Szpitaina 1/40, PL-85-826 Bydgoszcz)
 04-09: **Ferio-semajno fervojema**, KCE, Svislando (adreso supre)
 06-08: **Seminario pri interlingvistiko**, Pisanica, Bulgario (IEK, adreso supre)
 06-10: **Internacia Junulara Seminario**, Pisanica, Bulgario (IEK, adreso supre)

08-10: **Ŝoholara Esperanto-Renkontiĝo**, Zalaegerszeg-Lenti, Hungario (Zala-komitato de HEA, Pf. 263, H-8901 Zalaegerszeg)
 08-10: **20-a Trilanda Esperanto-Konferenco**, Arnoldstein, Aŭstrio (Martin Stuppig, Esperantostr. 175, A-9601 Arnoldstein; tel. 04255-29092; temo "E-o en la Laborkomunumo Alpoj-Adrio")
 10-12: **Esperanto-ekzamenoj laŭ la normo de UEA-ILEI**, KCE, Svislando (adreso supre)
 15-17: **Foiro de Kulturaj Metodoj**, sur la bordo de Tiso, Mártély, Hungario (Csongrád-komitato de HEA, Pf. 89, H-6801 Hódmezővásárhely)
 15-17: **Esperanto-Kongreso de Baden-Witttemberg**, Rastatt, FR Germanio (Helga Windisch, Stuttgarter Str. 74, D-7440 Nürtingen)
 17-30: **25-a Jubilea Esperantista Feriado** (parto 3 – "Renkontiĝo de diversaj generacioj"), Międzygórze, Pollando (Pola Esperanto-Asocio, Pk. 16, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wrocław 17)
 18-28: **Seminario "Tra arbaroj kaj valoj"**, Velingrad, Bulgario (Esocieto "St. Kalpazanov", Pk. 7, BG-4600 Velingrad)
 22-24: **3-a Balkanlanda Esperanto-Konferenco**, Ohrid (Makedonio), Jugoslavio (D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo; temo "Kontribuo de la E-movado al evoluigo de kultura kunlaboro kaj turismo en Balkanio")
 22-24: **Tagoj de Tibor Sekelj**, Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb)
 23-24: **Kunveno de Universala Pacifista Unuiĝo**, Udine, Italio (UPU, Via Chino Ermacora 51/5, I-33100 Udine; temo "Internacia lingvo por la paco kaj la interkompreno inter la popoloj")
 25-30: **15-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo**, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, Str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
 30-01: **Aŭtunaj Tagoj de EAF**, Oulu, Finnlando (Esperanto-societo de Oulu, Valtatie 6-8 B 15, SF-90500 Oulu)
 30-01: **9-a Renkontiĝo de la Esperantistoj-vegetaranoj**, Plovdiv, Bulgario (Sekcio de E-vegetaranoj, Pk. 151, BG-4000 Plovdiv)

Eldonejo Artur E. Iltis havas novan adreson: Postfach 1530, D-6670 St. Ingbert. Petu prospektojn kaj provnumeron de *Iltis-Forumo*, kies unua numero ĵus aperis.

Anglalingvajn tradukojn de Esperantaj poemoj serĉas por antologio W. Auld, 20 Harviestoun Rd., Dollar, Skotlando.

Familiojn uzantajn Esperanton volonte akceptos la familio Kupczak (Adamo kaj Aleksandra, 18-jaraj ĝemeloj Petro kaj Paŭlo kaj 12-jara filino Edyta): PL-34-340 Jeleśnia 638 A, Pollando.

Nove fondita Singapura E-Asocio bezonas helpon kaj inspiron. Vizitantoj, korespondantoj nepre kontaktu nin. Sino Lee Kim Kiew, Blk 11, Jalan Batu #04-152, Singapore 1543; tel. 4404746.

25-jara flegisto volas korespondi kun samprofesiaj en la tuta mondo: Mibalangano Mwengezya, Celza/Kitutu, BP 50, Cyangugu, Ruando.

S-ino Aaf Tebbenhof ŝanĝis adreson: ekde 890701 ŝi loĝos en Oude Kijk in 't Jatstraat 61-8, NL-9712 ED Groningen, Nederlando.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la koloĥonon.

Anoncetoj

Lernantoj 14- ĝis 15-jaraj en Ĉelabinsk, Sovetunio, serĉas korespondantojn pri plej diversaj temoj. Eŭgeno Vakulko (medicino, kantoj), ul. Kuznecova 10-25, SU-454028; Denis Polanski (E-movado, naturo), ul. Kurĉatova 8-60, SU-454092; Oleg Kamalov (sporto, muziko), str. S. Krivoj 39-7, SU-454080; Irina Gienko (muziko, biologio), str. N. Kovŝovoj 3-3, SU-454028; Marina Priŝĉepa (matematiko, kantoj), ul. Cvillinga 61-65, SU-454091.

Maria Busato Pisoni, ne povante tion fari unuope, dankas ĉiujn esperantistojn, kiuj estis proksimaj al la edzo Gaudenzio kaj al ŝi dum lia longa malsano kaj sekva forpaso, okazinta pasintjule. Ŝi klopodos reordigi la verkojn de la edzo kaj ilin eldonigi libroforme.

Korespondantojn serĉas la membroj de Esperanto-grupo Pachoro, Rua Felipe Cardoso 922, Santa Cruz, BR-23500 Rio de Janeiro, Brazilo.

19-jara iranano serĉas korespondantojn; interesiĝas pri moderna muziko, pentrarto, karateo, poŝtmarkoj. Ŝahram Hasan Zadeh, 21 Bast Ave., Takhti St., Rasht, 41737 Irano.

Korespondantojn-kunvojaĝemulojn, prefere el Nederlando kaj Svedio, serĉas 23-jara artpentristino-keramikisto. Aparte interesiĝas pri psikologio, literaturo, lingvoj, lukt-arto kaj ŝatas vojaĝi. Elena Zaja, Varŝavskoje ŝosse 71-1-138, SU-113556 Moskvo, Sovetunio.

En Zairio volas korespondi: F-ino Mbonani Nkendolo, p/a Kimenene Placide, B.P. 50 Ciza, Lukala (Bas-Zaire); F-ino Nita Nzola-Makabu, B.P. 21, Lukala (Bas-Zaire); S-ro Matindi-Luntadila, Av. Madimba No. 7, B.P. 7, Lukala (Bas-Zaire); S-ro Elder Mfumwa-Bana Nkulu, B.P. 7190, Lubumbashi 4 (Shaba); S-ro Nsumbu Kiboba, B.P. 50 Ciza, Lukala (Bas-Zaire); S-ro Nsiangani Yuku, B.P. 50 Ciza, Lukala (Bas-Zaire).

LA TORĈO PLUIRAS!

Denove en la stadiono estas jenaj membroj de la Stafeto-teamo:

Martín Fierro. José Hernández. El la argentinkampara hispana lingvo tradukis Ernesto Sonnenfeld. 289p. Stafeto: Belliteratura serio 26. UEA: Serio Oriento-Okcidento 5. Eposa "cignokanto" de la argentina gaŭĉo, kiu akuzas la urbanojn pro ties formorto inter la civilizita kaj la sovaĝa mondoj. 24,00 gld.

La Zamenhofa Esperanto. Simpozio pri -ata/-ita. Div. aŭtoroj. 329p. Stafeto: Movado 2. Eseo de diversaj Akademianoj kaj aliaj (Kalocsay, Lapenna, Pumpr, Régulo, Waringhien k.a.), prilumantaj la gramatikan signifon de la pasivaj participoj kaj ilia uzo fare de Zamenhof. 27,00 gld.

Koko krias jam! Ferenc Szilágyi. 225p. Stafeto: Belliteratura serio 4. Originala novelaro pri milito, pri la vilaĝo vivo, kaj pri la spertoj de la hungara aŭtoro en Svedio; simplastila, kun atenta observemo. 30,00 gld.

Kontralte. Marjorie Boulton. 286p. Stafeto: Belliteratura serio 5. Originalaj lirikaj poemoj, plenaj je naturobservo, homa pasio kaj humanismo – plus dozo da humuro. 30,00 gld.

Duonvoĉe. G. E. Maura. 179p. Stafeto: Beletraj kajeroj 19. Satiraj, lirikaj, erotikaj poemoj de granda vort-virtuozo. 15,00 gld.

Mendu de la Libroservo de UEA. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

★ HAVEBLA BELA FLAGO ESPERANTA

Ĝis nun oni kutime proponis nur flagetojn. Nun, finfine, estas mendeblaj ankaŭ belaj grandaj flagoj, en la grandeco 100x150cm, el centprocenta kotono, kun koloroj, kiuj permesas normalan lavadon. Mendu rekte ĉe **ELDONEJO & LIBREJO SONORILO**, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio. Prezo kun la sendokostoj: 1500 BF.

ZAMENHOF BILDRAKONTE: Ĝus aperis nova bildstria albumo, kolorilustrita. La tekstoj estas de Tilleux Ghislaine kaj la desegnaĵoj de Disano Bruno. Temas pri la vivo de d-ro Zamenhof. La prezo kun la sendokostoj: 390 BF. **ELDONEJO & LIBREJO SONORILO** estas registrita (rekonita) asocio, kaj estas membro de VBVB kaj de VUNB. Tio signifas ke Esperantistoj kiuj loĝas en Eŭropa Ekonomia Komunumo povas mendi ĉiujn librojn kiujn ni eldonas ĉe neesperantaj librovendejoj. Kaj **ELDONEJO & LIBREJO SONORILO** vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromarkato! kaj estas peranto i.a. de *El Popola Ĉinio*, *Fokuso (Internacia Komputado)*, *Heroldo de Esperanto*. Bonvolu pagi je nia poŝta ĝiro **BRUSELO: 000-0152140-44** je nomo de **ELDONEJO & LIBREJO SONORILO**, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio kun mencio de via mendo. Vi ankaŭ povas pagi je nia konto snrl-v ĉe UEA. Tel. 03.827.24.05 (tage kaj nokte, telefonrespondilo). **ELDONEJO & LIBREJO SONORILO** donas aŭtomate rabaton al ĉiu revendisto, kiu samtempe mendas minimume 3 ekzemplerojn de la sama titolo, ankaŭ por nepropaj eldonaĵoj. Vidu en *Heroldo de Esperanto*, kie aperis niaj kondiĉoj. Ni nur ne donas rabaton je niaj Esperantaj flagoj.

ESPERANTAJ KAJEROJ

“Rossetti nepre ĉeftalenta/ pri l' esperanta semantiko;
ĉe li, l' apliko de radiko/ ĉiam unike elokventas...”
William Auld en *Kvaropo*

POEMOJ KANTOJ KAJ SATIROJ DE ROBERT BURNS

tradukis Reto Rossetti kaj William Auld

Ĉi tiu sortimento... tre klare, fide kaj artisme ilustras la trezoron, kiun ni posedas en la poemaro de Burns. Reto Rossetti brile respegulas la riĉajn priskribojn... foje per versoj kiuj, laŭ mia opinio, eĉ plibonas ol la originalo.

A.R.M. en *La brita esperantisto*

LA PIRATOJ DE PENZANCO

farsa opero de W.S. Gilbert kaj Arthur Sullivan
tradukis Reto Rossetti

Oni nur povas admiri tiun, kiu provas traduki Gilbert, ĉar la teksto entenas vortludojn, sensencaĵojn, tute anglecajn humuraĵojn kaj estas multilate ligita al lia epoko.... Mi nur povas admiri kaj laŭdi la rezulton.

Diccon Masterman en *Esperanto*

LA DRESADO DE LA MEGERO

de William Shakespeare, tradukis Gerald C. Jervis
editoris Reto Rossetti

Mi ĝuis la fluan tradukon de Jervis, la antaŭparolon de Stone... kaj la prezenton de la tradukinto kaj la editoradon, ambaŭ fare de Reto Rossetti, laŭ kiu Jervis estis "tutsimple la plej klera ŝekspirologo en Esperantujo".

Georgo Kamaĉo en *Monato*

Mendu de la Libroservo de UEA: *Kantoj poemoj kaj satiro* 7,80 gld., *La piratoj de Penzanco* 10,50 gld., *La dresado de la megero* 18,00 gld. Libroservoj turnu sin por kvantaj mendoj al Esperantaj Kajeraj, C. P. Tielestraat 23b, 3023 TB Rotterdam, Nederlando.

Bibliofila Bukedo

Malpli ol po cent aŭtografitaj ekzempleroj de la unua eldono!



Kvaropo. Poemoj de W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis kaj R. Rossetti. 267p. Stafeto: Belliteratura serio 1. 48,00 gld.

La floroj de l' malbono. Charles Baudelaire. El la franca esperantigis pluraj tradukintoj, sub la redakto de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. 398p. Stafeto: Belliteratura serio 8-9. 60,00 gld.

Sonĝe sub pomarbo. Triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj. Julio Baghy. 221+8p. Stafeto: Belliteratura serio 14. 45,00 gld.

La bapto de Caro Vladimir. Karel Hlavíček Borovský. El la ĉeĥa tradukis Thomas Pumpr. Ilustris Josef Lada. 141p. Stafeto: Belliteratura serio 2. 30,00 gld.

Eseoj I. Beletro. Gaston Waringhien. 232p. Stafeto: Belliteratura serio 6. 45,00 gld.



Mendu de la Libroservo de UEA. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.